

# ESPERANTO INTERNACIA

Monata organo de la Internacia Esperanto - Ligo

Numero 3

Decembro 1936

Eldonanto :  
Internacia Esperanto-Ligo,  
142, High Holborn,  
London W.C.1.

Redaktoro : Teo JUNG  
223, Harstenhoekweg  
Den Haag/Scheveningen  
Nederlando

## Al la Cirkuleroj

de la nova provizora komitato de UEA, de f-ino Zamenhof, de s-ro Isbrücker, ktp. ni respondos tute simple, per la voĉo de D-ro Zamenhof mem:

Ĉiujn dubajn demandojn, kiuj koncernas la tutan esperantan aferon, kaj kiuj ne tuŝas la personan liberecon de ĉiu aparta esperantisto, solvu ĉiam pace, per regula interkonsiliĝo de viaj egalrajtaj elektitaj delegitoj kaj PER DISCIPLINA CEDO DE LA MALPLIMULTO AL LA PLIMULTO! Neniam permesu, ke en nia afero regu la principo « kiu pli laŭte krias, tiu estas prava »...

ZAMENHOF, Krakow 1912.

## Freŝa Vento

Antaŭ du monatoj — je la 18-a de septembro 1936 — ni dissendis al la Landaj Asocioj kaj Komitatoj la unuan oficialan informon pri la starigo de *Internacia Esperanto-Ligo*. Estas interese, do, taksu la ĝisnunajn rezultojn

*Landaj Asocioj*: Ĝis hodiaŭ (20 nov.) la jenaj landaj asocioj oficiale aliĝis:

Aŭstria Esperanto-Asocio;  
Belga Ligo Esperantista;  
Brita Esperantista Asocio;  
Germana Esperanto-Ligo en Ĉeĥoslovakujo;

Centra Dana Esperantista Ligo;  
Societo Franca por la Propagando de Esperanto;

Nederlanda Esperanto-Asocio « La Estonto Estas Nia »;

Norvega Esperantista Ligo;  
Pollanda Esperanto-Delegitaro;  
Sveda Esperanto-Federacio.

Krom tiuj, jam kunlaboras kaj kredeble tre baldaŭ aliĝos la landaj asocioj en Grekujo, Hispanujo, Italujo, Usono.

Komitato. — Ĝis nun aliĝis al la Provizora Komitato 24 el la 30 antaŭaj komitatanoj de UEA.

*Ĉefdelegitoj aŭ Perantoj* nun fukcias en la jenaj landoj:

Aŭstrujo, Belgujo, Britujo, Danujo, Francujo, Hungarujo, Italujo, Litovujo, Nederlando, Norvegujo, Portugalujo, Svedujo kaj Usono.

*Delegitoj*. — Proksimume 500 Delegitoj en 30 landoj jam aliĝis, kaj novaj aliĝoj alvenas po 20-30 ĉiutage.

*Membroj*. — Ni jam havas pli ol 600 aktivajn membrojn en 32 landoj, krom la simplaj membroj aligitaj pere de la landaj asocioj.

Estas aparte notinde, ke jam multaj

delegitoj kaj membroj, kiuj estis ekŝingintaj el la movado, aliĝis al ni, kaj tiu ĉi fakto evidentigas, ke la Jarlibro por 1937 estos multe pli ampleksa ol la nunjara. Ĝi aperos dum Marto kaj ni esperas aldoni al ĝi kelkajn novajn utilaĵojn. Ni ja volas, ke ĝi estu ne nur senkolora listo de delegitoj sed vere la ĉiama poŝlibro de la esperantistaro.

*Gazetoj*. — Niaj du oficialaj organoj *Heroldo de Esperanto* kaj *Esperanto Internacia* regule aperas, kaj estas evidente, ke la longe sopirita gazeta interkonsento trovis ĝeneralan aprobon. Ni tamen celas iom post iom plibonigi ilin sub la lerta redaktado de s-ro Jung.

*La Oficejo* nun normale fukcias — La donacita domo estas prekaŭ preta kaj ni eniros ĝin je la fino de novembro. Post la 1-a de decembro, do, nia adreso estas: *Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth (Herts), Anglujo*. Ni tre ĝojas anonci, ke je sabato la 12-a de decembro nia Prezidanto, Generalo *L. Bastien*, en la ĉeesto de aliaj eminentuloj formale inaŭguros la demon. Raportoj kaj bildoj de tiu ĉi grava okazaĵo por nia movado aperos en la esperantista gazetaro.

*Propagando*. — Pere de nia propaganda filio en Stokholmo kaj de aliaj helpantoj ni jam komencis fari ĉi tiun gravan laboron. Raportoj aperos en niaj gazetoj de tempo al tempo.

Jen konciza resumo de la laboro farita dum la pasintaj du monatoj. Kompreneble, estas multo, kion ne estas eble facile klasigi en tia resumo, sed ni opinias, ke eĉ la kelkaj supraj faktoj sufiĉas por montri ne nur, ke ni jam laboris,

sed ankaŭ, ke nia agado ricevis la aprobon de la granda plimulto. Antaŭ kelkaj semajnoj vizitis nin en Londono konata alilanda samideano. Mirante je la eĉ tiama progreso li diris: « Ŝajnas, ke freŝa vento blovas tra nia movado ». Multaj korespondajoj, kiujn ni ricevis, ankaŭ pravigas tiun aserton kaj kaŭzas ĉe ni la opinion, ke la starigo de IEL fine solvas problemon, kiu jam dum jaroj ĝenis kaj malfortigis nian movadon.

Kaj la estonteco? Tio dependas de la esperantistaro. Ni opinias, ke ni povos fari ĉian necesan laboron kaj ke kun ni volonte kunlaboros la landaj asocioj por certigi multe pli bonan progreson de la movado. Sed la homoj, kiuj finfine ebligis tiun laboron, tiun marŝadon al sukceso, estas la individuaj Esperantistoj. Se ili MILOPE aliĝos al IEL kaj tiel donos la necesan financan kaj moralan subtenon, se ili helpas en la propaganda laboro en siaj propraj sferoj, tiel, kaj nur tiel, ni pli kaj pli atingos la rezulton celatan. Ni scias, ke en kelkaj landoj pro diversaj cirkonstancoj progreso estas malpli rapida ol en aliaj; sed la sukcesoj en tiuj lastaj estu kuraĝigo kaj entuziasmigo al la laborantoj en la unuaj. Ni memoru, ankaŭ, ke nia laboro ne estas limigita al nia propra urbo, eĉ propra lando. Nuntempe en multaj rilatoj estas facile helpi antaŭenpuŝi la movadon en tute alia lando — kaj ĉu ne

# I. E. L. Marŝas

IEL marŝas. Aliĝis jam preskaŭ ĉiuj gravaj landaj societoj. Tio estas la plej bona pruvo, ke la esperantistaro nun deziras **labori**. Jam tudas ĝin la senfina kverelado kaj disputado de la pasinta tempo.

La nova centro en Londono bonege komencis sian funkciadon. Ĝi jam aperigis sep oficialajn informilojn, jam povis publikigi la adresojn de multnombraj delegitoj en la plej diversaj landoj, jam nombras aron da Dumvivaj Membroj, kaj konsiderindan nombron da Membroj-Subtenantoj. Tiuj nombroj kaj nomoj montras la fidon, kiun la esperantistaro alportas al la nova centro, al siaj elektitaj gvidantoj, kaj tiu fido kreskas de tago al tago.

La esperantista popolo en sia granda plimulto ne malfideliĝis al siaj elektitaj gvidantoj, kiam ĉi tiuj — pro neceso — prenis decidojn iom rigorajn. La esperantista popolo en sia granda plimulto komprenis la neceson de tiuj decidoj. Ĝi komprenis, ke temas pri vivo aŭ morto. Kaj la esperantista popolo denove sekvas siajn gvidantojn ankaŭ sub alia flago, sur kiu tamen brile lumas la sama verda stelo, la sama glora devizo.

Fakte, ŝanĝiĝis preskaŭ nenio krom la nomo kaj la sidejo. Gvidantoj kaj popolo restas la samaj. Ideo kaj idealoj restas la samaj. Kio staras ankoraŭ ekstere, ekster la kadro de IEL, tio ne

jam povis decidi pri la vojoŝanĝo — ĉu pro distanco, ĉu pro alia kaŭzo, — aŭ tio estas la samaj, kiuj ĝis nun jam estis ekster la kadro de UEA, ĉu pro simpla malbonvolo, ĉu pro iu malfeliĉa okazo aŭ cirkonstanco, kiujn forigi la estraro de IEL certe klopodos, kiam la startigaj laboroj estos finitaj. Nur tre malmultaj pro sincera sindonemo, pro troa respekto al arkaikiginta teksto de iuj paragrafoj, aŭ pro simpla nekompreneo pri la situacio plu apogas la UEA-torson. Sed evidente tiu torso ja ne povos vivi. La kapo, la membroj estas for. La sango jam delonge ekmankis al tiu mortonta korpo de UEA. Ĉu la koro? La koron reprezentas la amo, la sindono, la entuziasmo de la miloj kaj miloj da gesamideanoj tra la mondo, — kaj ĉi tiuj en sia granda plimulto jam estas hodiaŭ en IEL.

IEL marŝas. Ĉia provo haltigi tiun marŝon, aŭ starigi kontraŭ ĝi samcelan organismon, estos vana klopodo, estus peko kontraŭ nia unueco, estus krimo kontraŭ nia afero, kontraŭ nia ideo kaj niaj idealoj mem.

Tial « ni faru finon » al la kverelado, ni akceptu la faktojn ne jam estingebajn, la rado de l'evoluo jam plu turniĝas, nin plu ne ekscitu la pasinteco — ĝi estas for kaj ne revenos. Prefere ni **laboru!** Sed kiam la estraro de nia mondasocio metos antaŭ nin siajn proponojn por novaj statutoj,

tiam estos tempo kaj okazo por fari siajn rimarkojn kaj kritikojn, por prezenti dezirojn, por doni konsilojn. Tiam ni zorgu, ke ni evitu la erarojn de la pasinteco, ke la novaj statutoj estu tiaj ke ni ne bezonos poste plendi kaj vekrii, nek kvereli. Kaj tiam espereble, en Varsovio, okaze de la 29-a Universala Kongreso, ni povos festi ne nur la duonjarcentan jubileon de Esperanto, sed ankaŭ la finan, kaj definitivan, unuecon de la **tuta** sur nepolitika kampo aganta esperantistaro.

Dume ni firme apogu la gvidantojn de IEL. Ilia tasko ne estas facila. Ni ne plimalfaciligu ĝin per jam senutilaj riproĉoj. Ni mem elektis ilin siatempe. Ili klopodis aranĝi la aferojn laŭ sia plej bona konscienco. Se ili neglektis iun vorton en iu paragrafo, ili tamen faris tion ne pro malbonvolo sed en la plej sincera intenco **savi** valoran aferon kiu jam ŝajnis perdita. Kaj se iuj ne volas ekkoni, ke niaj gvidantoj pro sia kuraĝa, rapida decido meritas nian **dankon**, almenaŭ oni konsentu al ili — en la intereso de nia afero! — sian apogon kaj kunlaboron.

IEL marŝas. Jam ne estas dubo ke ĝi marŝas. Marŝu vi ĉiuj kun ĝi, en unu sama fronto, por la sama granda idealo! Ju pli ni marŝos unuigitaj, des pli frue ni astingos la celon.

« Ni faru finon! » — « Ek al labor'! » T. J.

## Ĉion kio koncernas la redakcion

direktu al: Teo Jung, Harstenhoekweg 223, Den Haag/Scheveningen, Nederlando. Koncerne la Administracion de E. I. oni direktu sin ekskluzive al la sidejo de Internacia Esperanto-Ligo, 142 High Holborn, London W. C. 1, Anglujo.

estas vere, ke grava sukceso en unu lando estas sukceso por ni ĉiuj?

Memoru, ke IEL ekzistas por unuecigi la esperantistaron, kaj por servi ĝin. Ĉiam ni estas kontentaj ricevi sugestojn kaj sciigojn — eĉ kritikojn — kaj se ili estas taŭgaj, ni agos laŭe.

En la venonta jaro ni festos la jubileon de Esperanto. Agu jam nun, por certigi, ke tiu jaro montru venkojn pli atentigajn kaj valorajn ol iam antaŭe.

*La oficeja stabo.*

## IELanoj, abonu vian oficialan semajnan organon!

De post la 1-a de oktobro nunjara, la semajna gazeto estas la aktuala oficiala organo de Internacia Esperanto-Ligo. Tiu gazeto grandformata ekzistas jam en sia 17-a jaro, kaj aperis de ĝi pli ol 900 numeroj. Kiu ankoraŭ ne konas ĝin, petu senpagan specimenon de la firmo:

### HEROLDO DE ESPERANTO

Harstenhoekweg 223,  
SCHEVENINGEN (Nederlando).

Aŭ, pli bone, aliĝu tuj al IEL por 1937 kiel MAH, aŭ mendu tuj minimume duonjaran abonon de supre citita adreso! Novaj abonantoj, kiuj t u j aliĝos al IEL kiel MAH por 1937, aŭ kiuj t u j abonos la semajnan organon minimume por duonjaro (januaro-junio 1937) rekte ĉe la supre citita adreso, ricevos la 4 numerojn de decembro 1936 tute senpage.

**Esperantistoj, subtenu vian solan semajnan gazeton!**

# Internacia Esperanto - Ligo

Centra Oficejo: 142, High Holborn, London W.C.1, Anglujo

## Oficiala Informilo

N-ro 5. 28 oktobro 1936.

### Komitato.

Novaj aliĝoj al la Provizora Komitato estas:  
D-ro P. Kempeneers, Belujo.  
Delfi Dalmau, Hispanujo.  
Prof. D-ro O. Bujwid, Polujo.

### Landaj Asocioj.

Oficale aliĝis:  
Reĝa Belga Ligo Esperantista.  
Sveda Esperanto-Federacio.

### Honoraj Membroj.

Aldone al la antaŭaj listoj:  
Prof. D-ro O. Bujwid, Kraków, Polujo.  
P. Nylén, Huddinge, Svedujo.

### Dumvivaj Membroj.

Aldone al la antaŭaj listoj:  
F-ino A. Champy, Antwerpen, Belujo.  
C. Daglio, Tortona, Italujo.  
Delfi Dalmau, Barcelona, Hispanujo.  
E. Fasce, Genova, Italujo.  
J. L'hermitte, Paris, Francujo.  
C. Marseille, Paris, Francujo.  
H. Popper, Böhmisch-Kamnitz, Ĉeĥoslovakujo.  
P. Stojan, Blausasc-Escarene, Francujo.  
D-ro A. Stromboli, Firenze, Italujo.

### Ĉef-Delegitoj.

Aldone al la antaŭaj listoj:  
Hungarujo (provizore). — P. Balkányi, Poŝto 507, Budapeŝto.  
Svedujo. — K. Wästfeld, Vikingag. 14-IV, Stockholm.  
Teritoria Sekr. franca. — R. Bernard, 26, rue Pierre Joigneaux, Bois Colombes (Seine).  
Teritoria Sekr. belga. — G. Van den Bossche, 21, Willemstraat, Antwerpen.

### Delegitoj.

La kvina listo:

#### Britujo.

Alford (Lincs.). — D: A.W. Leftwich, 53, West Street.  
Basingstoke. — D: H. Woolgar, 151, Winchester Road.  
Bradford. — VD: G. Luscombe, 34, Parsonage Road, West Bowling.  
Burnley. — D: J. Whittaker, 121, Rosehill Rd.  
Ea'bourne. — D: V.V. Sumfield, Station Street.  
Gateshead. — D: F. Sutcliffe, 223, Prince Consort Road.  
Gerrards Cross. — D: F.S. Leigh-Browne, « Windyridge » St. Marys Way.  
Harrogate. — D: A.O. Eaves, 44, Station Parade.  
London. — D: H. Moy Thomas, 142a, Camberwell Grove, S.E.5.  
(S.W.20). — VD: F-ino M.H. Skeate, 66, Peypys Road, S.W.20.  
(W.8.). — VD: F.C.D. Haberfield, 5, Lexham Gardens, W.8.  
(Universitataj aferoj) FD: F.S. Leigh-Browne, University of London, W.C.1.  
Preston. — D: F. Mercer, 81, Balcarres Road.  
St. Helens. — D: J. A.Chattaway, 7, Whitefield Road.  
Wolverhampton. — D: W.H. Hammonds, 102, Windsor Avenue.

#### Ĉeĥoslovakujo.

Třnava. — D: N. Lelovits, Kapitulska 9.

#### Egiptujo.

Fayoum. — D: N. Mahrous.

#### Francujo.

Chalons-sur-Marne. — D: G. Aussenac, 26, Rue du Port de Marne.  
Elbeuf (Seine-Inf.). — D: G. Saget, 4, rue St. Jacques.  
Neuilly-Plaisance. (S. et O.). — D: H. Mas-selier, 49, Bld. Fichot.  
Paris (Komerco). — FD: C. Marseille, 44, Rue de Lisbonne, VIII.  
(Radio). — FD: H. Favrel, 26, Avenue Dode de la Brunerie, XVI.  
(Turismo). — FD: M.D. Dupuis, 1, Rue Paul-Feval, XVIII.  
Saint-Cyr l'Ecole. (S. et O.) — D: R. Fil-liâtre, 34, Rue Francisco Ferrer.  
St. Leu le Forêt (S. et O.). — D: E. G. An-froy, 6, Rue de Paris.  
Toulon (Var). — D: A. Ricord, 115, Cours Lafayette.  
VD: L. Pauvrehomme, 13, Rue Regim-baud.  
Tours (Indre et Loire). — D: M. Poirier, 144, Rue Edouard Vaillant.  
Vence (Côte d'Azur). — D: S-ino C. Alziari-Duclos, Groupe Scolaire de Garçons.

#### Hungarujo.

Miskolc. — D: Lajos König, Pataky Sándor-tér 8.

#### Kanado.

Toronto. — D: H. Boyd, 31, Salem Avenue.

#### Litovujo.

Panevezys. — D: J. Kanas, Pasto dezute 78.  
VD: S-ino B. Braudiene, Laisves aik. 40.

#### Nederlando.

Amsterdam. — D: H. Bakker, Rokin 57.  
(Bankoj). — FD: P.M. Mabesoone, Pythagorasstraat 122.  
(Vegetarismo). — FD: D.E. Lissauer, Parnassusweg 28-II.  
(Medicino). — FD: W.M. Holzhaus, Michelangelostaat 34.  
Apeldoorn. — D: T.C. Reininga, Badhuisweg 72.  
Arnhem. — D: S-ino A. M. v. d. Wal-Bret-houwer, Amsterdamseweg III.  
Deventer. — VD: R. Koerselman, Brinkgre-verweg 3.  
Drachten. — D: J.D. de Vrieze, Noordkade 19-1.  
Epe (Gelderland). — D: K.H. Buschmann, Dellerweg.  
Groningen. — D: S-ino L. de Vries-Kanning, W. de Withstraat 16-a.  
Haarlem. — D: E. de Wolf, Joh. de Breuk-straat 18.  
Den Haag. — VD: F-ino B.J. Bowier, van Boetselaerlaan 18.  
(Instruado). — FD: F. Weeke, Meezen-laan 41.  
Henge'lo. — D: F-ino M. Klok, Krabbenbos-weg 170.  
Hilversum. — VD: F-ino A. Hellinx, v. Ol-denbarneveldtlaan 25.  
Koog aan de Zaan (N.H.). — D: G. Meijer, Breesstraat 80.  
Nijmegen. — D: J. R. Peters, Gerard Noodt-straat 8.  
Rotterdam. — VD: J. R. Grinigt, Jericho-laan 24-a.  
Roosendaal. — D: A.P. Borghout, Spoor-straat 38.  
Sijbrandaburen (Fr.). — D: G.C. Tinkelen-berg.

Terneuzen (Z.). — D: G.J.D. Dijselynck, Stationsweg 65.

Veendam (Gr.). — D: A.J. v. Dokkum-Bruins, Prins Hendrikplein 1.  
Vianen (Z.H.). — D: S-ino B.J. Blanken-steijn-Klomp, Voorstraat 11.  
Voorburg (Z.H.). — D: A. Latuner, v. Hal-lewijnlaan 473.

#### Palestino.

Bethlehem. — D: J. Aanas-tas.  
Jerusalem. — D: P. Lachowitzky, Kerem Quar.

#### Portugalujo.

Paio-Pires (Estrem.). — D: P. de Assunção Bagina, Aldeia de Paio-Pires Seixal.  
Vila Real. (Tras-os-Montes). — D: C. de Azevêdo, Quinta da Carreira.

#### Usono.

Los Angeles (California). — VD: J. R. Sche-rrer, 4474, West Adams Boulevard.

#### Membro-Subtenantoj.

Aliĝis kiel Membro-Subtenantoj:  
24. H. Popper, Böhmisch-Kamnitz, Ĉeĥoslo-vakujo.  
25. P. Le Brun, Kreuzlingen, Svisujo.  
26. D-ro P. Th. Justesen, Fannerup, Danujo.  
27. F. L. Wharff, Berkeley, Usono.

#### Kotizoj.

Lastatempaj ŝanĝoj en la valuto necesigis la jenajn ŝanĝojn en la tarifo por **Francujo**.

MJ: 12.50 MA: 37.00 MAH: 90.00 MS: 120  
Entrepreno: 40.00 Patrono: 500 francaj frankoj.

Cecil C. GOLDSMITH,  
Generala Sekretario.

## Oficiala Informilo

N-ro 6. 5 novembro, 1936.

### Landaj Asocioj.

Aliĝis dum la lasta semajno:  
Centra Dana Esperantista Ligo.  
Germana Esperanto-Ligo en Ĉeĥoslovakujo

### Honoraj Membroj.

Aldone al la antaŭaj listoj:  
W. H. Hirst, Huddersfield, Anglujo.  
F. Soubranne, Tulle, Francujo.

### Dumvivaj Membroj.

Aldone al la antaŭaj listoj:  
Gen. L. Bastien, Paris, Francujo.  
D-ro I. Dziedzic, Torun, Polujo.  
H. Goemans, Istanbul, Turkujo.  
R. Raven-Hart, La Ciotat, Francujo.  
N. K. Roscoe, Croydon, Anglujo.  
D-ro F. Spindler, Touques, Francujo.  
C. W. Taylor, Haverford, Usono.

### Ĉef-Delegito.

Aldone al la antaŭaj listoj:  
Svedujo: Karl Wästfeld, Lundagatan 44 uppg. 2. IV., Stockholm. Poŝtĉeka konto: 151288.

### Delegitoj.

Aliĝis dum la lasta semajno:

#### Acoroj.

Angra do Heroismo. — D: J. d'Avila, Strato Mousinho d'Albuquerque 82.

#### Aŭstrujo.

Amstetten (N. O.) — D: J. Biberauer, Ybb-strasse 28.

Innsbruck. — D: R. Kühnbacher, Mandels-bergerstrasse 3/II.

Salzburg. — D: R. von Lidl, Schwarzstrasse 1.

Steyr. — D: H. Zeller, Schlüsselhofgasse 25.

#### Britujo.

Bury. — D: B. S. Schofield, 86, Rochdale Rd.

Chorley (Lancashire). — D: J. R. Hall, 88, Park Road.

*Coventry*. — FD. (Virina) : S-ino W.E. Hailstone, 350, Tile Hill Lane.

*Gravesend*. — D: S-ino F. J. Wiles, Redland, Whitehill Lane.

*Huddersfield*. — D: W. H. Hirst, 18, Byram Street.

*King's Lynn*. — D: W.F. Lambert, «Dometo», South Wootton.

*Lowestoft*. — D: Pastro H. M. Jackson, 27, Carlton Road.

*Sowerby Bridge (Yorkŝ)*. — D: J. Hoyle, 13, Finkle Street.

*Uttoxeter (Staffs)*. — D: P. Griffiths, 39, Carter Street.

*Withernsea (Yorkŝ)*. — D: A.J. Turner, «Delmartin», Queen Street South.

#### Ĉeĥoslovakujo.

*Lazne Belohrad (Bohemujo)*. — D: L. Bechtold, Svehlova ul. 2.

*Praha XII*. — VD: H.H. Khel, Lobkovicovo nam. 2311.

#### Francujo.

*Anzin (Nord)*. — D: S-ino M. Mommaerts, 2bis, Rue Ferrer.

*Arcueil (Seine)*. — D: M.F. Moulinat, 22, Avenue Laplace.

*Beaune (Côte d'Or)*. — D: M. Lespagnol, Rue des Rôles.

*Beauvais (Oise)*. — D: R. Leroux, 2, Rue du Moulin, Marissel.

*Boulogne-Billancourt (Seine)*. — D: G. Robert, 29, Rue de l'Ancienne Mairie.

*Charenton (Seine)*. — D: G. Bachelier, 78, Rue de Paris.

*Don (Nord)*. — D: O. Lemichez, Chemin de Halage.

*Dunkerque (Nord)*. — VD: M. Nogé, 21, Rue du Maréchal Joffre.

FD (Komerco) : G. Vanhove, 6, Place du Palais de Justice.

*Durrenbach (Bas-Rhin)*. — D: C. Willinger, No. 65.

*Fontenay-sous-Bois (Seine)*. — D: L. Belhoste, 8, Rue Albert Ier.

*Guebwiller (Haut-Rhin)*. — D: H. Gerthofert, 5, Rue de Reims.

*Issy-les-Moulineaux (Seine)*. — D: P. Flageul, 9, Bd. Voltaire.

*Laigle (Orne)*. — D: C. Martin, 20, Rue de la Madeleine.

*Le Mans (Sarthe)*. — D: F. Lebatteux, 15bis, Avenue Louis Cordelet.

*Lens (P. de Calais)*. — D: M. Mendlewicz, 16, Rue Gambetta.

*Mâcon (Saône et Loire)*. — D: A. Martin, 43bis, Rue de Flacé.

VD: B. Beau, 23, Rue de Lyon.

*Maisonnais (Hte-Vienne)*. — D: P. Delage, Vieux Chateau.

*Malo-les-Bains (Nord)*. — D: E. Houzé, 121, Rue Gaspard Neuts.

*Montargis (Loiret)*. — D: J. Coulbault, 61, Faubourg de Lyon.

*Nancy (M. et M.)*. — D: J. Neukomm, 320, Rue du Montet.

VD: R. Roy, 25, Rue de Beauvau.

*Paris*. — FD (Gazetaro) : L. Agourtine, 30, Rue Duranton, XV.

FD (Jura scienco) : R. de Rienzi, 20, Rue Pierre-Curie, V.

FD (Medicino) : J. E. G. Philippet, 15, Rue Soufflot, V.

FD (Tekniko) : C. Tiard, 209, Rue du Faubourg St. Denis, X.

*Poix (Somme)*. — D: L. Bouvier, 2, Rue St. Martin.

*Rosendaël (Nord)*. — D: C. Vernay, 33, Rue Marceau.

VD: J. Platéy, Rue Guillain Prolongée.

*Rouen (Seine-Inf.)*. — VD: R. Parrington, 6, Rue du Loup.

*Sablé-sur-Sarthe (Sarthe)*. — D: L. Eschenbrenner.

*Saint-Denis (Seine)*. — D: A. Germaine, 9, Place de Geyter.

*Saint-Etienne (Loire)*. — D: L. Thèvenin, 1, Rue Cécile Sauvage.

*Saint-Quentin (Aisne)*. — D: C. Violette, 52,

Boulevard Gambetta.

*Soissons (Aisne)*. — D: J. Bourniche, 8, Avenue Voltaire.

*Thouars (Deux-Sèvres)*. — D: H. Fiez, 22, Avenue Victor Leclerc.

*Tulle (Corrèze)*. — D: F. Soubranne, 74, Rue de la Barrière.

*Vaires (S. et M.)*. — D: M. Cottray, 12, Avenue Jean Jaurès.

*Vendeuvre s. Barse (Aube)*. — D: J. Duffaud, 7, Rue Théophile Boutiot.

#### Hungarujo.

*Hodmezövásárhely (Csongrád)*. — D: Imre Hajdu, II. Százaz u. 9.

#### Italujo.

*Trieste*. — D: Prof. A. Camuffo, Placo G. B. Vico 9. II.

#### Jugoslavujo.

*Ljubljana*. — D: Joze Kozlevcar, Mestna Hranilnica, Presernova ulica.

*Vukovar*. — VD: St. Metzinger, urba veterinaro.

#### Kanado.

*Hamilton (Ontario)*. — D: E.J. Bengough, 54, Whitton Road.

#### Lihtenŝtejno.

*Schaan*. — D: D-ro K. Kauffmann, P.O.B. 17260.

#### Paleŝtino.

*Jerusalemo*. — VD: J. Kohen-Cedek, Gymnasia Ivriith, Rehavia quar.

#### Polujo.

*Lódz*. — D: W. Pfeiffer, Piotrkowska 47, Ksiegarnia Seipelta.

#### Portugalujo.

*Lisboa*. — D: J. Saldanha Carreira, Ave. Duque de Loulé, 50/III.

#### Rumanujo.

*Mociu (Cluj)*. — D: D-ro K. Mocsi.

#### Trinidad-insulo.

(Brita Okc.-Hindujo).

*Tunapuna*. — D: Pastro W. Broens, Mount St. Benedict.

#### Turkujo.

*Istanbul*. — VD: H. Goemans, Posta Kutusu 1064.

#### Membro-Subtenantoj.

Aliĝis kiel Membro-Subtenantoj:

28. D. Ponti, vojaĝanta Cseh-instruisto.

29. P. H. Mooij, Den Haag, Nederlando.

30. G. L. Preedy, Caversham, Anglujo.

31. W. Bailey, Penrhyn Bay, Kimrujo.

32. C. M. Houghton, Abadan, Irano.

33. D-ro W. A. McK-Gidson, Bathgate, Skotlando.

34. A. E. Smith, Kettering, Anglujo.

35. F. E. Wadham, Epsom, Anglujo.

36. J. A. Teixeira da Costa, Porto, Portugalujo

37. J. Rambousek, Ceske Budějovice, Ĉeĥoslovakujo.

Cecil C. GOLDSMITH,  
Generala Sekretario.

## Oficiala Informilo

**N-ro 7. 12 Novembro, 1936.**

#### Landa Asocio.

Ĵus aliĝis:  
Norvega Esperantista Ligo.

#### Komitato.

Aldone al la antaŭaj listoj:  
Prof. D-ro St. Kamaryt, Ĉeĥoslovakujo.

#### Honora Membro.

Aldone al la antaŭaj listoj:  
A. Landenné, Huy, Belgujo.

#### Dumvivaj Membroj.

Aldone al la antaŭaj listoj:  
A. Pino Alegret, Valencia, Hispanujo.

J. S. Clough, Folkestone, Anglujo.

C. A. Fairman, Epsom, Anglujo.

B. P. Megahy, Preston, Anglujo.

E. G. Phillips, London, Anglujo.

#### Delegitoj.

La sepa listo:

#### Argentino.

*Perez Millan*. — D: I. M. Rodriguez.

*Rosario*. — D: H. J. Ceretti, Str. 9 de Julio 3301.

#### Belgujo.

*Aalst*. — D: R. de Kegel, Denderstr. 58.

*Antwerpen*. — D: G. Vermandere, Wetstr. 15.  
VD: M. Jaumotte, 44, Av. de Bruyn.

*Bruges*. — D: F-ino Y. Thooris, 4, rue de l'Outre.

VD: K. de Coster, St. Gilleskerkstraat 9.

*Bruxelles*. — D: D-ro P. Kempeneers, 19, Av. Montjoie, Uccle.

VD: Th. Kerremans, 75, Vier Windenstr., Molenbeek.

(Teknika instr.) FD: J. Alofs, Zomerverblijflaan 16, St. Lamberts-Woluwe.

(Filatelio) FD: R. Brihay, 44a, rue de l'Orge, Ixelles.

(Jurnalismo) FD: R. Debel, 334, rue Leopold I-er, Jette.

(Komerco) FD: J. Derks, rue Rogier 226, Schaerbeek.

(Instruado) FD: F-ino A. Jennen, 72, rue de l'Albanie.

(Kuracistoj) FD: D-ro Maes-Dubois, 16, rue Botanique, III.

(Konstruaĵoj) FD: R. Picquet, 132, rue Berkendael.

(Blinduloj) FD: S-ino F. Staes, 11, Av. de la Liberté, Koekelberg.

*Hasselt*. — D: P. van Genechten, Place Léopold 11.

*Huy*. — D: A. Landenne, rue des Brasseurs 2.

*Kortrijk*. — VD: A. Cogne, Moeskroenstr., 11.

*La Louvière*. — D: A. Tassin, rue St-Joseph 1.

VD: E. Jacques, rue A. Warocqué 122.

*Mechelen*. — D: H. Rainson, Hombeekse Steenweg 54.

*Mortsel*. — D: E. Seghers, Prins Leopoldlei 5.

*Nieuwpoort*. — D: L. Braet, Langestraat 6.

*Ninove*. — D: L. Cogen, Drève 52.

*Nivelles*. — D: J. De Maeyer, Collège Ste Gertrude.

*Oostduinkerke*. — D: P. Benoît, Grand Hôtel.

*Ostende*. — D: J. Snykers, 32, rue de l'Eglise.

VD: L. Houpe, 148, Frère Orbaristraat.

*Roelare*. — D: O. Berteloot, Doorgangstr. 12.

*St-Nicolas W*. — D: P. R. Geerinck, Place Cardinal Mercier.

*Seraing*. — D: J. Soyeur, rue du Chêne 91.

#### Britujo.

*Folkestone*. — D: J. S. Clough, 35, Cheriton Gardens.

*Halifax*. — D: F. Taylor, 19, St. Ives Road

*Leeds*. — D: W. Gregory, 4, Highthorne View, Upper Armley.

*London (Asekuro)*. — FD: J. V. Moffat, 222, Leigham Court Road, S. W. 16.

*Windsor*. — D: F-ino N. E. Powers, 20, High Street.

#### Bulgarujo.

*Gorna Orhovitza*. — D: H. Belmustakov, str. Trapezica 12.

#### Ĉeĥoslovakujo.

*Kuĥlenny-Hradec Kr.* — D: Fr. Pytloun, Hybešova 632.

*Olomouc (Komerco)*. — FD: J. Mastny, Riegrovastr.

*Reichenberg (Juro)*. — FD: D-ro E. Gruber, Robert-Blum-strasse 15.

*Solka*. — D: A. Saliger, Solka apud Nem. Pravno.

#### Danujo.

*Aarhus (Trafiko)*. — FD: Ch. Hougaard, de Mezasvej 17.

(Sporto). — FD: D-ro H. Eggerup, Søndergade 76.

*Holbæk*. — D: H. Hansen, Ringstedvej 17.

*Laurbjerg*. — D: Ch. Heilskov.

*Odense*. — D: E. Windeballe, Rewentlowsvej 56-1.

*Onsild.* — D: K. A. Andersen, Nr. Onsild Skole.  
*Ringkøbing.* — D: K. G. Olsen, Hoffgaardsvej 14.  
*Risskov.* — D: C. A. Hvorslev, Asylvej 1.  
*Skanderborg.* — D: P. Jørgensen, Nørregade 7.

**Finlando.**

*Somero.* — D: J. Vilkki.

**Francojo.**

*Amboise (Indre & Loire).* — D: A. Magnant, 79, rue de Tours.  
*Arras (P. de Calais).* — VD: P. Brunet, 7, rue Saint Michel.  
*Berck-Plage (Nord).* — D: G. Lemaire, 32, rue Aristide Danvin.  
*Blausasc (A. M.).* — D: P. Stojan.  
*Bois-Colombes (Seine).* — D: R. Bernard, 26, rue Pierre-Joigneaux.  
*Bougival (S. & O.).* — D: G. E. Giroud, 3bis, Quai Rennequin.  
*Buxières d'Aillac (Indre).* — D: F. Baronnet.  
*Calais.* — D: G. Perrin, 8, rue de Rome.  
*Cannes (A. M.).* — VD: A. Triou, 33, rue Clémenceau.  
*Clermont-Ferrand (Puy-de-Dôme).* — D: M. A. Deculty, 3bis, Impasse du Pont de Naud.  
*Creil (Oise).* — D: F-ino M. Boissard, 8, rue Charles Duguet.  
*Caillac (Tarn).* — D: G. Roy, Direktoro de « La Caravane Universitaire ».  
*Hautmont (Nord).* — D: F. Charlet, 7, rue du Clos.  
*Jeumont (Nord).* — D: F-ino S. Bretelle, 40, rue Victor Hugo.  
*Jouarre (S. & M.).* — D: Michelis di Rienzi, Château Beauchaine.

*Le Cannet (A. M.).* — D: S-ino L. Benoist, Villa Lilian, rue Jonquière.  
*Les Lilas (Seine).* — D: S-ino A. Daniel, 8, rue Tapis Vert.  
*Marseille.* — VD: H. Isnard, 33, rue Granoux.  
*Paris.* — D: G. Dronchat, 68, rue d'Alesia, XIV (Poŝto). — FD: M. Arger, 46, rue Lamartine.  
*Phalempin (Nord).* — D: P. Hulin, Ecole Maternelle.  
*Provins (S. & M.).* — D: E. Bertheau, 1, rue Rateau.  
*Rosny-sous-Bois (Seine).* — D: A. Fouques, 70, rue de la Côte des Chênes.  
*Saint Benoît (Vienne).* — D: R. Lathus, Minoterie.  
*Vanves (Seine).* — D: L. Cozic, 157, Avenue de Clamart.  
*Villejuif (Seine).* — D: J. Marty, 14, Avenue des Ecoles.  
*Vire (Calvados).* — D: A. Legret, 26, Cité des Capucins.

**Hindujo.**

*Ambur (North Arcot Dist.).* — D: F-ino A. Christensen.

**Hispanujo.**

*Barcelona.* — D: Prof. Delfi Dalmau, Carrer Valencia 245.  
*Valencia.* — D: A. Piñõ Alegret, Str. Colon 24.

**Irlando.**

*Belfast.* — D: A. R. Campbell, 15, Delhi Street.

**Jugoslavujo.**

*Dubrovnik.* — D: D-ro T. Velnić.  
*Palić.* — D: A. Šugar, Horgoški put 77.  
*Vukovar.* — D: P. Hideghéthy.  
*Sibeniĉ.* — D: A. Anweiler.

**Kanado.**

*Esquimalt (B. C.).* — D: R. Redhead, 629, Canteen Road.

**Latvujo.**

*Zeltini.* — D: A. Lazdinš, « Kropas ».

**Nederlando.**

*Blijham (Gr.).* — D: H. J. Jonker, B. 137.  
*Culemborg (Geld.).* — D: W. Grolleman, Westersingel 9.  
*Leeuwarden (Fr.).* — D: P. Hendriks, Verstolkstraat 7.  
*Scheveningen.* — D: C. H. Bramkamp, 22, Pansierstraat.

**Polujo.**

*Brzesc n/B.* — D: M. Demidowicz, Sienkiewiczza 10.  
*Mława.* — D: R. Sakowicz, ul. Reymonta 3.

**Rumanujo.**

*Suceava.* — D: J. Berhang, Str. Stefan Voda 6.

**Membro-Subtenantoj.**

Aliĝis kiel Membro-Subtenantoj:  
 38. E. Dodge, Washington, Usono.  
 39. W. Norris-Jones, Dartmouth, Anglujo.  
 40. W. T. Gayfer, Cleethorpes, Anglujo.  
 41. J. L. Mackenzie, Insulo Wight, Anglujo.  
 42. O. M. Wihl, Colwyn Bay, Kimrujo.

**INSIGNOJ**

**I.E.L.**-Insignoj estas nun haveblaj kiel butonoj aŭ broĉoj. Prezo (afrankite) 1 ŝilingo angla aŭ 5 internaciaj respondkuponoj.  
 Cecil C. Goldsmith,  
 Generala Sekretario.

# Joseph R. Scherer saltas tra Eŭropo



**HUNDO KONATA AL SAMIDEANOJ EN 40 STATOJ.**

Certe ne multaj hundoj atingas tiel vastan konatecon kiel « *Amiko Skippy* » — blanka drathara foksteriero, kiu fidele akompanis nian mondvojaĝantan samideanon J. R. Scherer dum liaj aŭtomobilvojaĝoj tra 40 ŝtatoj de Usono. Ĝi estas tre ĉarma besto, kaj ĉiuj homoj, kiuj ne scias ĝian veran nomon, nomas ĝin « *Howcute* », t.e. « kiom ĉarma! ». Nun « *Amiko Skippy* » aŭ « *Howcute* » jam malpacience atendas trans la oceano la revenon de sia mastro; sed ĉi tiu provizore ankoraŭ estas « saltanta » tra la *malnova* kontinento.

Kiel anoncite en Heroldo de la 5-a de aprilo, nia mondvojaĝanta samideano s-ro Scherer, Prezidanto de la Esp.-Asocio de Norda Ameriko, nun de post julio vojaĝas salte tra Eŭropo.

Li forlasis Amerikon ĉe la fino de paroladserio en multaj usonaj Somer-Universitatoj kaj Rotary-Klubo, kaj alvenis en Hamburgo per V. S. President Harding, kaj post kelktaga halto en Praha partoprenis la *Universalan Kongreson en Wien*, kiel Delegito de la usona registaro kaj de E.A.N.A.

Sekvis por li dusemajna libertempo en Svislando, sed li apenaŭ havis tempon por viziti ĉiujn parencojn, ĉar li volis kapti 5-800 novajn bildojn grimpante en la alpa montaro. Tuj sekvis kvar

semajnoj da streĉa laboro en la hejmo de lia onklo en *Bellinzona*. Li estis promesinta al la samideanaro 500 novajn lumbildojn pri « *Hollywood* » kaj « *Tra Usono kun ruliĝanta hejmo* ». Sed pro manko de tempo li ne jam en Ameriko povis prepari la diapozitivojn. Do anstataŭ ĝui la maloftan libertempon plene, li devis sin kaŝi en « *nigra ĉambro* » de la frua mateno ĝis noktomeze. Li unue devis elekti 500 negativojn el kelkaj miloj faritaj en 40 ŝtatoj de Usono dum diversaj prelegvojaĝoj. Dum kvin tagoj li klopodis. Kiam fine li havis « *nur 1000* » belegajn negativojn, li apenaŭ povis decidi kiujn forlasi. Sed decido devis esti farata. Finfine oni neniam povus uzi pli ol 200-250 lumbildojn en

unu parolado. Sekvis la fotografa laboroj. Imagu la malfeliĉon de la onklo pro tio ke la nevo volis sidi en la mallumo, kiam ekstere brilis la itala suno! Lia patrino, kiu nun ripozas en *Bellinzona*, ne tiom surpriziĝis, ĉar ŝi jam tro bone konis la fotografan entuziasmon de la filo. La laboro devis nepre sukcesi, ĉar en multaj landoj la gesamideanoj jam reklamis por la novaj Scherer-paroladoj.

Fine de septembro sekvis rekta vojaĝo tra *Basel-Hamburg* al *Kopenhago*. En *Stockholm* s-ro Scherer devis komenci sian *duan eŭropan prelegvojaĝon*. La unua parolado okazis en la *Stokholma altlernejo* je la 2-a de oktobro. Kvankam s-ro Scherer estis tre laca kaj iomete malsana kaj pro tio ne montris la kutiman entuziasmon kaj vervon, la *Stockholm Tidningen & Dagbladet* enhavis bonan kaj longan raporton: « ..... Estis tre esperantista publiko kiu kolektiĝis... por aŭdi s-ron Scherer... kaj estis unika okazo por la esperantistoj de *Stockholm*, ĉar la prelegisto jam vojaĝis tra 47 landoj kaj preskaŭ ĉie uzis Esperanton. Li povis festi jubileon, ĉar li ĝis nun faris 1000 paroladojn... li montris belajn lumbildojn pri *Japanujo* kaj *Hollywood*. Kiel Esperantisto li trovis ĉie pordojn malfermitaj... kaj oni mon-

tris al li la plej intimajn aĵojn de la hejma vivo... »

En *Smedjebäck* en la salono estis preskaŭ plena kun 100 aŭskultantoj, kaj la fama Esperanto-verkisto kaj tradukisto *Stellan Engholm* skribis jene pri la parolado pri « Siamo, la lando de la blankaj elefantoj »...: « Ĉiuj, kun kiuj mi parolis pri la prelego, tre ŝatis ĝin. Iom longa, ili diris; sed tio ne malutilis, ĉar ĝi estis tiel interesa... »

En *Jönköping* raportis s-ro *Knut Jensie* en la loka gazeto:

«...multaj personoj kolektiĝis por fari kun la konata mondvojaĝanto s-ro Scherer rapidan vojaĝon tra Usono. Mr. Scherer havas specialan manieron, kiam li prelegas. Li sidas apud sia bone funkcia aparato, elŝorcante amason da belaj bildoj, dum kiam li prelegas. Estas bildoj, kiujn li mem faris dum siaj vojaĝoj. Dum pli ol du horoj la publiko sekvis la oratoran preligiston, vojaĝante per lia ruliĝanta hejmo, de loko al loko, tra vastaj dezertoj, palmkovritaj valoj, tra urbegoj kun nubskrapantoj kaj en hejmojn de la homoj. S-ro Scherer bone konas la arton de fotografado kaj li trafte kaptas bildojn, kiuj povas interesi la sciavidajn ĉeestantojn. Pere de Esperanto li renkontis diversajn homojn dum sia vojaĝado, riĉajn kaj malriĉajn, kaj li vizitis iliajn hejmojn kaj vivis pli intense kun ili ol multaj aliaj prelegistoj mondvojaĝantaj. »

El *Hällekis* venis jena raporto por Heroldo: « S-ro Scherer... parolis pri la « Romantika Hollywood » (12 okt.). La prelegosalono kun 200 sidlokoj estis plenplena (Hällekis havas nur 800 loĝantojn — do ĉeestis 25 % de la loĝantaro). S-ro Scherer montris tre bonajn lumbildojn kaj la temo estis tre interesa. La publiko estis tute kontenta kaj dankis per fortaj aplaŭdoj. S-ro Helge Johansson traduktis tre bone. E. A. »

*Orebø-Kurieren* (8 okt.) skribis pri la parolado en *Karlskoga*: « S-ro Scherer parolis pri Japanujo kaj Hollywood en Esperanto kun amaso da interesaj lumbildoj kiuj donis bonan enrigardon malantaŭ la kulisojn de la bela filmurbo. S-ro Scherer ankaŭ montris la strangajn morojn (de la Oriento) kiel oni manĝas, dormas, banas ktp. Estis granda publiko. »

El *Malmö* venis jena raporto por Heroldo (31 okt.): « La parolado de s-ro Scherer pri « Siamo, la lando de blankaj elefantoj » estis trege interesa temo, kaj granda publiko ĉeestis, kiu estis tre, tre kontenta. Ŝajnas al mi, ke jam la titolo de la parolado estis sufiĉe bonega por allogi la publikon, kaj mi povas konstati, ke la enhavo de la parolado estis eksterordinare bona kaj fruktodona por nia movado. Samideane: Jan Strönné, Prez. de la Malmö Klubo kaj de la Skania distrikto de la SEF. »

*Serio de ok paroladoj* en la *Skaraborg* gubernia distrikto alportis amason da bonaj artikoloj en *Skövde* kaj ĉirkaŭaj urboj. La jena resuma artikolo montras, kiom valora estis la vizito de s-ro Scherer por la Esperanto-movado en tiu distrikto de Svedujo. Elĉerpitaj linioj el:

*Skaraborgaren en Skövde, 23 okt.*: « Dum la pasinta semajno la gubernio Skaraborg estis vizitata de la amerika ĵurnalisto kaj ĉirkaŭmondvojaĝisto Joseph R. Scherer el Los Angeles. Lia vojaĝo en la gubernio estis aranĝita de la Esperanto-distrikto... kaj ok prelegoj estis farataj en sep lokoj. Inter la multaj temoj, pri kiuj s-ro Scherer parolas, la kluboj ĝenerale elektis « La romantika Hollywood » kaj « Intima Japanujo ». — Dum la prelegoj pri « Hollywood » kiuj estis ilustritaj de ege bonaj kaj klaraj bildoj, la prelegisto prenis kun si la publikon por fari vagadon malantaŭ la kulisoj de la filmurbo, kaj oni eksentis ke la vivo interne de la sekuraj muroj de la filmstudioj eble ne ĉiam estas tiom « romantika ». Pere de la multaj intimaj bildoj ankaŭ estis donita enrigardo en la vivmanieron de multaj « grandaj » steloj, kies vivo certe ne

ĉiam estas « dancado sur rozoj ». — La Japanprelegoj donis bonan bildon de tiu popolo de Oriento, kaj la fotoj, kiujn la prelegisto mem kaptis en multaj japanaj hejmoj, kies gasto li estis, estis trege unikaj en sia speco. La prelegoj, kiuj estis tradukataj sveden, donis novan pruvon pri la eksterordinare granda rolo, kiun ludas la Esperanto-lingvo kiel rekta komunikilo spirita inter la popoloj. Dum siaj vizitoj en nia distrikto s-ro Scherer kaptis proks. 200 bildojn, kiujn li envicigos en prelegoj pri Svedujo kaj ĝia vivo... »

Eĉ en malgrandaj vilaĝoj paroladoj povas sukcesi, se la samideanoj scias kiel aranĝi kaj faras la necesan antaŭ-laboron.

El *Genevad*, vilaĝo kun 400 loĝantoj, raportas la UEA-delegito: « S-ro Scherer parolis en nia vilaĝo en plenplena salono antaŭ 80 personoj (20 % de nia loĝantaro) pri la « Intima Japanlando ». La 200 lumbildoj estis multe admirataj, kaj la parolado de 90 minutoj estis tre amuza kaj instru. La publiko estis tiel kontenta, ke ĝi ne volis forlasi la salomon, kaj s-ro Scherer devis plu rakonti. La gazetoj multe skribis pri s-ro Scherer antaŭ kaj post la parolado. Estis bonega propagando por Esperanto. En la proksimuma tagĵurnalo:

*Lahom Tidningen* (20 okt.): « S-ro Scherer estas modesta homo. Li klarigis ke li ĝis nun vizitis NUR 47 landojn — bona komenco por mondvojaĝanto — ...La bildoj estis trege bonaj, kaj la tuta parolado estis plej interesa... S-ro Scherer profetas (du semajnojn antaŭe) ke Roosevelt certe estos reelektata al la prezidanteco de Usono. Li klarigis ke la mondfama semajna revuo *Literary Digest* neniam antaŭe eraris en sia prov-voĉo-kolektado (*Straw-votes*), sed ke tiun ĉi fojon ĝi certe eraras, kiam ĝi antaŭdiras la venkon de Landon. »

Jen kion diras la svedaj lernejestroj! Ĉie rekomendu dumtagajn paroladojn de s-ro Scherer en viaj lernejoj!! Vidu ankaŭ en *Heroldo* de 5 aprilo 1936:

*Jönköping Kristana Popol-Atleternejo*: La rektoro s-ro Rob. Fur skribas jene: « S-ro Scherer donis hodiaŭ trege interesan paroladon en nia lernejo en Esperanto pri « Hindujo la fabellando » kun multaj trege bonaj kaj belaj bildoj. Tiu ĉi prelego elstis instru laŭ multaj vidpunktoj, ekzemple laŭ religihistorio, sociaj cirkonstancoj, politiko kaj geografio. S-ro Scherer trege bone elparolas, kaj oni bone aŭdas kaj komprenas lin (la tradukon tre lerte faris s-ino Märta Jensie). 24 okt. (Lernantoj inter 18-20 jaroj.)

*Popollernejo de Falköping*. (13 okt.) Skribis la rektoro s-ro Hilding Svendsson: La parolado de s-ro Scherer en nia lernejo antaŭ 250 infanoj (kiuj pagis enirprezon) estis pri « Japanujo kaj ĝia intima vivo ». La parolado estis ilustrita per tre bonaj bildoj kaj bone interpretita el Esperanto (de s-ro Aberg). S-ro Scherer tre facile kapablas paroli antaŭ infanojn (7-12-jaraj), kaj mi povas nur rekomendi lin al aliaj lernejestroj, ĉar la tuta afero estas tre utila, ĝojiga kaj interesa.


El *Shilingard* raportas la prezidanto de la klubo, 24 okt., jene:

«...La parolado estis tre interesa kaj amuza. Li montris multajn belajn bildojn memfaritajn. La publiko montris sin tre kontenta kaj aplaŭdis fervore. La vizito de s-ro Scherer estis bonega propagando. Sekvis kelkaj agrablaj horoj en la hejmo de la prezidanto. Certe la vizito de s-ro Scherer estis granda ĝojo kaj instru por ĉiuj geklubanoj. Lerte tradukis s-ino Thoreus. La gazetoj faris tre bonajn raportojn. »

S-ro Scherer faris entute 28 paroladojn dum oktobro en Svedlando. Dume li jam finis sian prelegvojaĝon en Danlando kaj alvenis en Norvegujo je la 10-a de novembro. Li faris radio-paroladon en Oslo, merkrede je la 11-a de novembro kaj nun vojaĝas kaj prelegas en

Norvegujo ĝis *Trondheim*, de kie li veturos per ŝipo rekte al Nederlando. Li alvenos en Rotterdam, dimanĉon, la 22-an de novembro, dum la posttagmezo, por tuj komenci sian prelegadon tra Nederlando.

Samideane salutas: *Margrethe Noll*, impresariino, *Fredericiagade 6*, *Kopenhago K.*, Danlando.



Ŝi skermas ankaŭ por Esperanto.

*F-ino Teresa Stellacci*, studentino en Napoli (Italujo) gajnis en nacia skerma selekto — konkurso de la faŝistaj junulinoj — la finajn konkursojn, la 17-an de oktobro nunjara. F-ino Stellacci scias skermi ankaŭ por Esperanto, estante nia samideanino kaj fratino de nia konata samideano-pastro Prof. Agostino Stellacci, Vicoletto Trinità Spagnoli 3, Napoli (Italujo). Publikigu tiun ĉi informon en naciaj kaj Esperantaj gazetoj kaj sendu unu aŭ du ekzemplerojn de tiuj gazetoj al la supre citita adreso de Prof. Stellacci!

— Al f-ino Stellacci ni prezentas nian koran gratulon.

## Unueco

estas la fundamento de forta movado. La Esperanto-organizo bezonas ĝin pli necese ol iu alia movado. — Do, gesamideanoj tutmondaj

**l a b o r u interkonsente ! !**

# Propagando de Esperanto

## Parolado de E. Malmgren en la Viena Kongreso

(Daŭrigo)

### Fakaj asocioj.

Kiam oni propagandas Esperanton, oni speciale devas atenti la fakajn asociojn, kaj kompreneble antaŭ ĉio la idealajn asociojn. Pro tio ni devas senĉese trovi eblecojn enpenetri inter la skoltoj, bontemplanoj, pacifistoj ktp.

Multaj esperantistoj penadas por ricevi tujan venkon de Esperanto en tiuj rondoj per kongresdecidoj ktp. Persone mi tamen ne fidus je tiaj rezolucioj. Ĉar mi multfoje spertis, ke rezolucioj kaj dekretoj valoras tre malmulte. Estas io tute alia, se ekz. en la mondjamboreo de la skoltoj, kiu okazos venontjare en Nederlando, ĉeestas 1.000 skoltoj kiuj kapablas paroli Esperanton kaj kiuj preferas paroli Esperanton. Tiam neniu povas neglekti nian lingvon. Pro tio mi nun faras la proponon, ke en ĉiu lando la enlanda Esperanto-asocio starigu almenaŭ unu premion por skolto, kiu kapablas paroli Esperanton, kaj ke tiu premio konsistos el senpaga vojaĝo kaj senpaga restado en la venontjara mondjamboreo. Prefere la asocioj tamen starigu ekz. 5 tiajn premiojn, laŭ certaj kondiĉoj. Se ni faras tian ofereman geston, tiam ni akirus al ni la atenton kaj la dankemon de la skoltasocioj kaj de iliaj gvidantoj. Ni opinias, ke se ni povus tiamaniere kolekti Esperanto-skoltojn el ekz. 10 landoj okaze de la mondjamboreo, ni havus vere grandan estontan utilon! Esperantistoj, ni koncentru niajn fortojn por en tiu ĉi jaro speciale subteni la Esperanto-instruadon inter la skoltoj! Informu nian oficialan organon pri viaj paŝoj tiu ĉi rilate!

### Sistema laboro de la Esperanto-organizaĵoj.

Amikoj, imagu, ke vi intencas konstrui novan domon por vi kaj via familio. Kion vi faras plej unue? Jes, vi preparas aŭ preparigas konstruoplanon. Sen antaŭa planado vi nenion komencas. Vi provas ĉiujn detalojn pripensi, por ke la domo estu plej praktika, plej fortika kaj plej konforma je viaj deziroj.

La samon ni devas fari, kiam ni konstruas la Esperanto-domon, la Esperanto-organizaĵon! Se ni agas sen antaŭa planado, la rezulto estos fuŝaĵo! Tute certe. Kaj mi kaj vi tion scias, ĉar ni ĉiuj tion spertis. Ĉu ne? Kaj ĉu ni do ne plibonigu nin!

Ĉiu estraro de loka klubo, nacia asocio kaj internacia ligo devas prepari laborplanon por la venonta sezono! Kaj

tiun laborplanon la koncernaj jarkunvenoj devas pritrakti. La plej ĉefa programpunkto de la diversaj jarkunvenoj devas esti ĝuste la traktado de tiu laborplano. Se ni volas iam serioze labori por Esperanto, tiam ni en la jarkunvenoj ĉesu la senfinan diskutadon pri statutoj, paragrafoj kaj personaj atakoj! Nia celo ja estas labori por Esperanto. Ĉu ni do ne plej ĉefe okupu nin ĝuste pri tiu temo, kiam ni kunvenas? Jes!

### La junuloj laboru.

Sinjoroj ĉefoj, nun vi do decidis konstrui domon. Kiujn laboristojn vi preferas? Ĉu ne junajn energiplenajn? Aŭ ĉu vi preferas mem ĉion fari, ĉion masoni, ĉion ĉarpenti? Certe ne. Vi dividu la laboron kaj elektas spertajn laboristojn por ĉiu fako. Same pri Esperanto-domo. La maljunuloj de nia movado devas doni konsilojn kaj fari sugestojn pri tiu kaj tiu ago, sed kiam estas eble oni elektu pli junajn por efektiviigi la decidojn. Mi scias, ke al la junuloj mankas la multjara sperto kaj ke ili pro tio faras multajn erarojn. Sed antaŭ ĉio ili estas energiaj (bedaŭrinde ankaŭ ekzistas neenergiaj junuloj!), kaj kiam ili faras eraron, la maljunuloj povas korekti ilin. Kaj tiam la junuloj ne devas koleriĝi, sed plibonigi siajn agojn!

Per miaj vortoj mi ne celas tion, ke la maljunaj esperantistoj devas forlasi la gvidon de nia movado. Tute ne. Speciale pro tio, ke ofte mankas taŭgaj junuloj. Sed en tiuj okazoj, kiam montriĝis, ke la movado stagnis, oni devas pripensi, ĉu ne estus saĝe aldoni novan sangon. Ĉar laŭ mi la plej granda peko, kiun oni povas fari al nia movado, estas lasi la movadon stagni. Stagnado signifas malantaŭenirado. Sed tion ne toleras nia movado. Ĉiam antaŭen estas ja nia devizo.

Ne estu kontenta pri UNU venko, ne estu fiera pri jam atingitaj rezultoj! Memoru, ke post unu ŝtupo venos alia, de nove alia, ankoraŭ alia. Kaj se VI ne kapablas konstante porti la ŝarĝon sur viaj ŝultroj, tuj transdonu ĝin al alia. Sed ne toleru, ke oni metas la ŝarĝon sur iu ŝtupo por ripozi. Ĉiam antaŭen, ĉiam pli supren!

### Ĝeneralaj propagand-konsiloj.

Mi rimarkis, kaj certe ankaŭ vi rimarkis la samon, ke la granda publiko pli ŝatas ekzaktajn informojn pri nombro de esperantistoj ktp. ol ĝeneralajn vort-

ojn pri la bono de Esperanto. Pro tio mi konsilas, ke oni ĉiam kiam tio estas ebla, ne nur ĝenerale fanfaronu pri nia lingvo. Kaj kiam oni demandas vin pri la nombro de esperantistoj, klarigu, ke nur malmultaj estas organizitaj. Estas same ankaŭ rilate al aliaj lingvoj. Se homo en via lando lernas fremdan lingvon, tiam li plej ofte ne aliĝas al speciala asocio de la koncerna lingvo. Ne, li lernas la lingvon por praktike uzi la lingvon. Same pri Esperanto. Sed ankaŭ diru, ke inter la esperantistoj estas tiom da fervoraj personoj kiuj promesis propagandi la lingvon, ke ili fondis specialajn klubojn, federaciojn kaj internacian organizaĵon! Tio ja montras tute neordinaran intereson por fremda lingvo.

Mi ankaŭ atentigas vin pri tio, ke vi ne ĉiam inter viaj amikoj propagandu Esperanton, ĉar tiam vi tedas ilin. Nur je certaj okazoj vi informu ilin pri gravaj Esperanto-novaĵoj. Sed en la ĉiutaga vivo vi silentu pri nia lingvo. Portu ĉiam vian verdan stelon, sufiĉas! Iom post iom ili estos scivolaj, kaj ili venos al vi por demandi. Tiamaniere vi plej bone utilos al nia lingvo!

### Kion devas fari tutlanda asocio?

La tutlanda asocio devas starigi laborplanon por unu jaro, du jaroj, tri jaroj aŭ kvin jaroj. Tiu plano devas enhavi dezirindan kreskon por la asocio rilate al nombro de kluboj kaj anoj. Prefere oni starigu premion por tiu klubo, kiu akiris la relative plej grandan kreskon. Se la asocio havas propagandan kason, oni aranĝu konkurson inter la kluboj pri monkkolektado al tiu kaso. Ankaŭ tiam ne forgesu fiksi gajnon, premion!

Jam pli frue mi parolis pri korespondakurso. Aranĝu! Kaj same pri gazetara servo!

Ĉar mi rimarkis, ke multaj lokaj Esperanto-kluboj sufiĉe necerte scias aranĝi la programojn de la Esperanto-kunvenoj, mi rekomendas al la landaj asocioj pretigi modelajn kunvenprogramojn. Tiujn modelprogramojn la asocio dissendu en la komenco de la laborjaro. Bonan helpon tiurilate donas la libreto « La Esperantoklubo » de E. Malmgren. Mi ankaŭ rekomendas franc-lingvan libron pri la sama temo de s-ro Petit.

Ĉar montriĝis saĝe koncentri la varbadon al Esperanto-kursoj en la tuta lando dum certa semajno, mi rekomendas al la asocioj nomi iun semajnon

« Esperanto-semajno ». Por helpi la klubojn fari specialan Esperanto-propagandon dum tiu semajno, kiu okazu en la fino de septembro aŭ komenco de oktobro, mi konsilas al la asocio pretigi 3 aŭ 4 taŭgajn gazetartikolojn, kiujn la loka grupo povos enpresigi en la loka gazeto. Se estas eble la asocio ankaŭ preparu specialan propagandnumeron de la nacia Esperanto-gazeto. Tiu numero kompreneble devas esti presita nacilingve kaj devas enhavi valorajn artikolojn pri Esperanto, tiel ke la ĝenerala publiko havu imagon pri la taŭgeco de Esperanto por plej diversaj fakoj. La asocio ankaŭ preparu prelegmanuskripton pri Esperanto, kaj la lokaj kluboj uzu tiun manuskripton dum publika propaganda vespero. La publika propaganda vespero enhavu prelegon pri Esperanto kaj cetere muzikon, kanton, eventuale nacilingvan teatraĵon de amatoroj ktp.

La asocio pretigu ankaŭ migrantan ekspozicion de belaj Esperanto-libroj, afiŝoj, broŝuroj ktp. En kelkaj landoj oni jam havas tian migrantan aŭ «flugantan» ekspozicion, kiun oni senpage disponigas por unu semajno al la lokaj kluboj. Oni persvadas iun librovendiston senpage meti la ekspozicion en la montran fenestron. Mi havas la sperton, ke estas sufiĉe facile aranĝebla. Kaj mi asertas, ke la propaganda valoro estas granda. La ekspozicion oni kompreneble ne forgesu dum la Esperanto-semajno!

Se la cirkonstancoj tion permesas, la asocio nepre dungu eksterlandan prelegiston, kiu travojaĝos la landon por fari publikajn paroladojn pri ĉi tiu temo, prefere turisma temo. Tiu prelego kompreneble ne tuŝu Esperanton, sed la prelegisto ja parolas en Esperanto, kaj tio estas sufiĉa propagando.

Kiam mi parolas pri prelegoj, mi nepre devas tuŝi la proponon, kiun mi antaŭ duonjaro faris al la oficiala sveda turistasocio. Mi nome proponis al ili, ke ili preparu por ni serion de lumbildoj pri Svedlando, kondiĉe ke ni preparas la paroladon pri la sama temo. La turist-asocio devigis sin senpage disponigi al ni la nomitajn lumbildojn, kaj la parolado jam estas preta, verkita de nia lerta samideano magistro Karl Söderberg. Nun la tuta materialo estas preta, kaj kiu ajn landa asocio rajtas senpage lui la prelegon, kiu estas vere instrua, interesa kaj bela. La intenco estas, ke la landa asocio faru planon por rondirigi tiun prelegon inter la lokaj kluboj. Kaj ĉar la lumbildoj estas el celuloido kaj ne el vitro, oni ne devas timi, ke la bildoj difektiĝos. Krom tio la tuta bildserio estas sufiĉe malpeza, tiel ke la transportkostoj estos malaltaj. — Mi nun proponas, ke ĉiu alia landa asocio pretigu (se eble per helpo de la registaro aŭ alia oficiala organizaĵo) similan prelegon pri

la propra lando. Se ĉiu lando pretigis tian turistprelegon, nia Esperanto-movado povos montri al la ekstera publiko, ke nia lingvo kaj nia organizaĵo estas vere internacia kaj donas veran utilon ne nur al la reklamo por la propra lando sed ankaŭ al ebleco ekkoni aliajn landojn laŭ la okuloj de la enlandanoj. Tuj komencu prepari tian turistprelegon! Mi volonte disponigos specimennon de la celuloida lumbildo, por ke vi sciu kiel aranĝi.

Laŭeble la tutlanda asocio ankaŭ dungu aŭ peradu eksterlandajn instruistojn por la lokaj kluboj. La asocio entute devas zorgi pri tio, ke troviĝos taŭgaj instruistoj por la Esperanto-instruado. Mi do speciale atentigas vin pri aranĝo de instrukcikursoj por Esperanto-instruistoj. Tiaj kursoj prefere okazu dum la somero, kiam multaj homoj libertempas. Kaj oni devas havigi moralan aŭ ekonomian subtenon de kiom eble plej multaj oficialaj kaj neesperantistaj organizaĵoj. En kelkaj landoj oni jam dum pluraj jaroj atingis en tiu medio mirindajn rezultojn. Kaj kun via permeso mi post kelkaj monatoj donos detalajn informojn pri saĝa preparo de tiaj instrukcikursoj. Evidente la diversaj landoj devas agi samtempe kaj sammaniere, ĉar tiam ni poste havos eblecon nin turni oficiale al pluraj ŝtatoj por ricevi apogon de la parlamentoj kaj registaroj. Sed memoru, ke ni mem devas unue prepari la grundon, kaj fari la grundon.

### Aranĝu konkursojn!

Se mi demandas vin, kiu idealista movado akiris la plej grandan publikan popularecon, ĉiu el vi respondos: La sportista movado. Kaj vi pravus. La sportistaj eventoj havigis al si ekstreme grandan popularecon. Kial? Nu, kompreneble ekzistas multaj kialoj, sed unu el la plej gravaj estas, ke oni povas tikli la homojn per konkursoj. Kaj streĉaj konkursoj. Se ni esperantistoj estas saĝaj, ni devas apliki la konkurstan emon ankaŭ en nia movado. Kaj nun mi do atentigas vin ĉiujn, landajn asociojn kaj lokajn klubojn: aranĝu konkursojn! Kaj starigu premiojn! Vi povas elekti kiel premiojn ekz. senpagan vojaĝon al universala kongreso, aŭ pokalon, aŭ medalon ktp. La kluboj povas konkursi inter si pri kresko de membronombro, pri Esperanto-ekzamenoj, pri vendo de propaganda gazeto ktp. Jes, amikoj, kiom da eblecoj! Eluzu ilin!

Ĉar mi ĵus tuŝis la sportan movadon, mi ne povas silenti pri poŝono, kiun mi faris okaze de la Stokholma kongreso, kaj kiun ĉi jare ripetis la ĝenerala sekretario de la kongreso 1937, nome ke ni devas kunligi kun la Esperanto-kongresoj internaciajn sportkonkursojn. Mi

havas la senton, ke ni per tiaj internaciaj Esperanto-sportkonkursoj povus havigi neordinaran atenton al niaj kongresoj kaj samtempe al nia lingvo. Grandiozaj perspektivoj!

### La kluboj kaj la asocioj.

La lokaj kluboj devas senti, ke ili havas kontakton kun la nacia centro. Aliflanke la estraro de la tutlanda asocio devas ricevi informojn de la kluboj pri la stato en la lando. Por krei kaj konservi tiun kontakton mi konsilas, ke la landa asocio pretigu presitan formulon por Kvaronjara raporto, kaj tiun raporton la lokaj kluboj devas ensendi al la centro ekz. en januaro, majo, julio kaj oktobro. La raporto devas enhavi informojn pri la nomoj de la estraranoj de la klubo, pri la membronombro, pri kotizoj senditaj al la centro, pri prelegoj en la klubo, pri kursoj, pri propagandmanieroj kaj fine ankaŭ eventualajn proponojn al la centro. Mi scias laŭ la spertoj en kelkaj landoj, ke la esperantista vivo komencis vere flori dank' al tiuj devigaj raportoj, ĉar la plej multaj kluboj ja hontas raporti, ke ili nenion faris! Volonte mi donos detalan proponon pri modela teksto de tia raportblankedo.

La tutlanda asocio sendas al la lokaj kluboj siajn proponojn kaj informojn aŭ pere de la nacia gazeto aŭ pere de multobligitaj cirkuleroj.

### Kunlaboro estas necesa.

Kiel vi rimarkis, mi konstante revenas al tiu vorto: Kunlaboru! Kaj per tio mi nun ankaŭ finas: Mia laboro por la internacia propagando, kaj via laboro por la enlanda Esperanto-propagando estas tute dependa de nia kunlaboro. Ni fidu unu la alian! Mi bone konscias pri tio, ke mi faras erarojn, kaj ke ankaŭ vi faras erarojn. Sed tio ne multe gravas. Tio kio gravas estas, ke niaj faroj montras la bonan intencon.

Mi ankaŭ ripetis, ke vi ĉiam informu la Esperanto-centron pri ĉiuj novaj ideoj, kiujn vi opinias taŭgaj. Ĉiam estu malavara rilate al novaj bonaj ideoj: lasu ankaŭ aliajn personojn, klubojn kaj asociojn eluzi ilin. Ĉio ja estas por nia komuna celo.

Mi ankaŭ petas, ke vi tuj informu la oficialan Esperantogazeton pri ĉiuj venkoj en via loko kaj en via lando. Ĉar via informo pri nova Esperanto-strato, pri subteno de fama persono ktp. certe donos vivigan impulson al la Esperanto-movado en aliaj landoj.

Jes, amikoj, batali ni devas — batali kontraŭ niaj malamikoj kaj kontraŭ la indiferentuloj. Sed inter ni devas regi paco, por ke ni povu rezultiĉe kunbatali kaj kunlabori.

Vivu la harmonia internacia Esperanto-kunlaboro!



# Eminenta nederlanda pedagogo pri Esperanto

S-ro *Direktoro J. Peper*, prezidanto de la « Unuiĝo de direktoroj de la komercaj lernejoj » en Nederlando, direktoro ĉe la komercaj mezlernejoj en *Amersfoort* (jam dum 25 jaroj), membro de la ŝtata ekzamena komitato por komercaj sciencoj, gvidanta fama pedagogo kaj verkinto de altvaloraj faklibroj, kompleze donis al mi la okazon lin intervjui por *Heroldo de Esperanto* kaj *Esperanto Internacia*.

Jen la intervjuo:

*Gl.*: S-ro direktoro, bonvolu havi la afablecon respondi la jenajn demandojn: Kiam kaj kie vi estis atentigita pri Esperanto?

*S-ro Dir. P.*: Jam antaŭ kelkaj jaroj la sciigoj en la gazetaro vekis mian intereson. La verko de D-ro Zamenhof havas mian simpatian: el tio sekvis, ke mi konigis al mi la fundamentajn elementojn de ĉi tiu mondhelplingvo; sed mia troŝarĝo pro multaj laboroj estis la kaŭzo, ke tio devis ŝufiĉi, kaj ne permesis al mi pli profundan Esperanto-studadon.

*Gl.*: Kiel gvidanta pedagogo, ĉu vi jam vin okupis pri Esperanto?

*Dir. P.*: Jes, certe! Kiam estiĝis ĉe mi la intenco, Esperanton enkonduki fakultative en la instruprogramon de mia komerca lernejo, mi antaŭe decidis aranĝi detalan enketon ce la delegitoj en Nederlando kaj eksterlando. Kvankam la rezultato min ne tute kontentigis, tamen mi decidis enkonduki Esperanton en mian lernejon.

*Gl.*: Kia estas via sintenado kaj opinio rilate Esperanton?

*Dir. P.*: Mi simpatias kun ĝi, kondiĉe ke ĝi estu mondhelplingvo kaj servu por la internaciaj celoj.

*Gl.*: Kion vi jam faris por Esperanto: a) ĝenerale; b) en oficialaj rondoj; c) en via lernejo; d) en pedagogiaj rondoj; e) en la fakgazetaro?

*Dir. P.*: a) Mi kunlaboris ĉe la starigo de unueciĝo de la esperantistoj en mia urbo *Amersfoort* (Nederlando);

b) Mi atentigis la urbestaron kaj la inspektoron por la komerca instruado pri la graveco de la Esperanto-instruado en la mezlernejoj, kaj al la urbestaro mi prezentis la proponon envicigi Esperanton en la instru-programon de la urba komerclernejo;

c) Mi enkondukis la Esperanto-instruadon en la 3-an kaj 4-an klasojn de la komunuma komerclernejo;

d) En mia organizo de la direktoroj ĉe la komerclernejoj mi pledis por la

enkonduko de Esperanto ankaŭ en iliajn lernejojn:

e) En la « Revuo por la instruado sur ekonomia bazo » aperis de mi verkita artikolo « Esperanto kaj la komercinstruo ».

*Gl.*: Kiun signifon vi atribuas al la Esperanto-instruado en la komercaj lernejoj?

*Dir. P.*: Por la komercinstruado ĝi kompreneble havas nur relativan valoron; ĝi povas utili al tiuj lernantoj sekvantaj la instruadon en la komerclernejoj, konsiderante ilian estontan laborokampon en la praktika vivo. Kaj ĉi tiu graveco des pli kreskos, ju pli multe Esperanto disvastiĝos en la mondo. — Krom la *materia utilo*, kiun Esperanto havas por la lernantoj — aŭ, pli bone dirite, *povas* havi — oni konsideru ankaŭ la *idealan* utilon. Per la scio de ĉi tiu mondlingvo ili kapablas korespondi kun loĝantoj de tiuj landoj, kun kiuj skriba interrilato alimaniere preskaŭ ne estas ebla.

*Gl.*: Ĉu laŭ via opinio Esperanto havas valoron por la internaciaj komercokaj trafikoj?

*Dir. P.*: Sendube, kaj precipe por la internacia trafiko!

*Gl.*: Kia estas via opinio pri la estonteco de Esperanto?

*Dir. P.*: La intereso por Esperanto precipe en la lastaj jaroj kreskas ankaŭ en tiuj landoj, kie oni tion ne atendis, ekzemple oni nur rigardu al Anglujo. Neniu alia mondhelplingvo rikoltis tian sukceson kiam ĝuste Esperanto. Kaj tial mi firme kredas, ke la estonteco por Esperanto estas tre favora. Sed tiam la *esperantistoj ankaŭ en la propraj rondoj nepre ne neglektu la idealan celon*, starigitan de la elpensinto D-ro Zamenhof, kaj ili *serĉu siajn fortojn en la unueco kaj ne en la malĉonĉordo!* Mia opinio ne devus okazi, ke en negrandaj lokoj estu pluraj Esperanto-klubo.

*Gl.*: Kiun metodon vi rigardas la plej bone aplikinda por la enkonduko de Esperanto en la lernejojn?

*Dir. P.*: Mi ne sentas min kompetenta respondi ĉi tiun demandon. Krome: Unuavice ne gravas la metodo ĉe la instruado — numero 1 estas tiu homo, kiu staras antaŭ la klaso. De li dependas je 99 %, ĉu liaj lernantoj iom lernas. Unu fakto bedaŭrinde malhelpas: Pro la troŝarĝo de la instruplano en niaj mezlernejoj — ankaŭ en la komerclernejoj — la Esperanto-instruo povas okupi nur modestan lokon. La lernejo devas atingi ĉe la lernantoj tiun gradon, ke

ili estu kapablaj buŝe kaj skribe uzi Esperanton tiamaniere, ke ili ne faru gravajn erarojn.

*J. Glück*

Ĉi tiu intervjuo de la konata eminentulo eble denove helpos iomete antaŭenpuŝi nian movadon en la lernejoj. Se iu samideano aŭ Esperanto-gazeto uzos ĉi tiun intervjuon aŭ tradukos ĝin por nacilingvaj gazetoj, tiam mi ĝentile petas sendi al mi du ekzemplerojn, kiujn mi por la bono de Esperanto bezonas kaj uzos. Nur vere grandskala komuna laboro povas helpi al ni. Adresu al: Prof. *Julius Glück*, Jacob Catslaan 18, *Amersfoort*, Nederlando.

## Esperanto kaj Bellamy.

Estas rimarkinda fakto ke ofte grandaj ideoj naskiĝas samtempe en la cerboj de homoj kiuj tute ne konas unu la alian kaj ofte loĝas en tre diversaj lokoj.

En la sama tempo kiam en Eŭropo D-ro Zamenhof publikigis sian lingvon kaj skribis pri la « interna ideo » de Esperanto, vivis en Ameriko Edward Bellamy kiu verkis libron enhavantantan novan ekonomian sistemon, ankaŭ bazitan sur humanismo, frateco kaj internaciismo kaj en kiu li eĉ profetas la uzon de mondlingvo.

En sia verko Bellamy donas al ni bildon de la socio en la jaro 2000-a, kiam ĉiuj anoj de la nacio havos la samajn rajtojn sed ankaŭ egalajn devojajn; kiam ne plu ekzistos senlaboreco, mizero, ekonomiaj krizoj; kiam anstataŭe la granda teknika kaj scienca progreso pruviĝos esti beno, ebliganta al ĉiu vivon senzorgan.

La bazo de la Bellamy-sistemo estas la ekonomia egaleco de ĉiuj dum la tuta vivo.

La nuntempa evoluo de tekniko kaj scienco ebligas abunde provizi la tutan homaron je ĉiuj bezonaĵoj per minimuma laboro; sed la ekzistanta ekonomio, bazita sur konkurenco, profito, nepersona mono, nekontrolata produktado ktp., kaŭzas ke al milionoj da homoj mankas la necesaj vivrimedoj, dum aliflanke grandaj amasoj da varoj estas detruataj, ĉar ili estas nevendeblaj.

La ruinigaj konsekvencoj de la nuna sistemo povas malaperi nur se la produktado estas regulata laŭ la kolektiva bezono de la homaro, ĉiu ricevante egalan porcion kaj farante sian parton de la komuna laboro; nur tiam povos komenci daŭra prospero por la tuta homaro.

Por disvastigi ĉi tiujn ekonomiajn ideojn fondiĝis la Internacia Asocio « Bellamy », kiu utiligas Esperanton por la internacia propagando.

I.A.B. estas neŭtrala rilate politikon kaj religion, kaj ĝiaj anoj apartenas al ĉiuj klasoj de la popolo.

La suprenomita verko de Edward Bellamy baldaŭ aperos en Esperanto, sub la titolo « Rigardante malantaŭen ».

En la konvinko ke ĉiu tago de prokrasto daŭrigas kaj pligrandigas la mizeron de milionoj da homoj, la I.A.B. alvokas ĉiujn bonintencajn personojn al la propagando de la bela idealo.

Informojn kaj propagandan materialon volonte havigos la Centro por Internacia Propagando de la I.A.B., sekretario Gerard H. Bosma, Kerkweg 152, Santpoort (Nederlando).

# Adreo Cseh Jubileos La Esperanto-kursoj en la Internacia Altlernejo en Helsingór (Danlando).

En ĉi tiu somero la esperantistaro inde festis la 25-jaran jubileon de la eminentaj verkistoj K. de Kalocsay kaj Julio Baghy.

Eble malmultaj scias, ke ne malpli grava jubileo atendas nin. Ankaŭ Adreo Cseh jam de 25 jaroj laboras en la servo de nia movado.

Ni ne bezonas tie ĉi larĝe preparoli la meritojn de Adreo Cseh, kiu senripoze laboradas por antaŭenpuŝi la movadon.

Adreo Cseh pliriĉigis nian anaron je miloj da novaj, entuziasmaj adeptoj. Lia fama metodo estas aplikata de centoj da instruistoj en la tuta mondo, vekante intereson ĉe novaj kaj malnovaj esperantistoj.

Nun ni deziras feste rememori la fakton, ke li dum 25 jaroj senĉese dediĉis sin al Esperanto.

La Haga grupo « Fine Ĝi Venkos » festos sian 30-jaran jubileon je lundo, la 28-a de decembro en salono de la Zoologia Ĝardeno, Benoordenhout 2, Den Haag. La intenco estas en la sama vespero festi la 25-jaran jubileon de Adreo Cseh kaj transdoni al li memorajon pri ĉi tiu grava fakto.

Ni invitas la esperantistojn partopreni en ĉi tiu festo persone aŭ perletere. Leteroj por laŭtleĝo en la festvespero povas esti sendataj al la jena adreso: F-ino C. E. van Voorthuijsen, Noord-eindsplein 2 a, Leiden, Nederlando.

Tiuj, kiuj volas partopreni en la donaco (dependonta de la kolektiĝinta

La Esperantistoj, kiuj vidas en sia lingvo unu el la rimedoj, por alproksimigi la popolojn, uzas ĉiun okazon, por realigi sian idealon. Tion ili atingas ne nur per sia korespondado kun gesam-ideanoj tutmondaj, sed ankaŭ per la internaciaj kongresoj. Krome kelkloke en diversaj landoj oni aranĝas internaciajn kursojn.

Konata stud-centro estas la *Esperanto-Domo en Arnhem*, kiu ĉiujare allogas multajn diverslandajn verdstelojn.

Gratulinda kaj ĝojiga estas la fakto, ke de kelkaj jaroj ankaŭ en Danujo troviĝas tia Esperanto-centro, kie dum la somero la bonege laboranta *Dana Esperanto-Instituto* organizas samspaciajn kaj same sukcesplenajn kursojn.

Dum kvar jaroj tiuj internaciaj kursoj okazis en la urbeteto *Silkeborg* en Jutlando. En ĉi tiu jaro Dana Esp.-Instituto aranĝis siajn somerajn kursojn en la fama *Internacia Altlernejo en Helsingór*, la urbo de Hamlet.

Grandega estis la intereso pri tiuj kursoj. Oni antaŭe sciigis, ke en la Altlernejo estas loko por 65 kursanoj. Sed venis... 110! Ĉiun liberan ĉambron en la proksimeco de la Altlernejo D.E.I. luis, por kontentigi siajn gastojn. Al multaj, kiuj tro malfrue anoncis sin, D.E.I. devis skribi, ke por ili ĉi-jare ne plu estas loka. La 110 kursanoj venis el 10 landoj. Inter ili estis 32 svedoj (el kiuj unu estas mi), 28 danoj, 20 nederlandanoj, kaj la aliaj venis el Norvegujo, Germanujo, Aŭstrujo, Ĉeĥoslovakujo, Anglujo, Estonio, Hungarujo.

La *elementan Cseh-metodan kurson* gvidis la ĉie konata, de ĉiu amata kaj fama *f-ino M. Saxl* el Berlino. Kun multa sukceso ŝi kaj ŝiaj entuziasmaj gelernantoj propagandis nian lingvon inter la ne-esperantistaj aliaj kursanoj de la Altlernejo.

La *perfekta kurso* estis por tiuj jam sufiĉe progresintaj gesamideanoj, kiuj deziris perfektigi kaj akiri parol-ekzercon en la lingvo. En tiu

kurso instruis *s-ro Friis* (Aabyhøj), sekretario de la Dana Esp.-Instituto. Lerte kaj ĉiam klare li gvidis nin tra la labirinto de la gramatiko. Mirindan laboron li faris, por organizi tiujn kursojn. Dankeme ni ĉiuj memoras lian ĉiaman helpemon, lian sindonan fervoron.

F-ino Saxl perfektigis nin en la parola uzado de la lingvo. Ni ĉiuj estas konvinkitaj, ke neniu povas pli multe kuraĝigi kaj entuziasmigi la kursanojn ol ŝi. Treege interesaj estis la prelegoj de *s-ro de Waard* (Rotterdam) pri nia literaturo. Liaj spritaj vortoj kaptis ĉies atenton. Ni ankaŭ tre multe ŝatis la prelegojn de nia meritplena, sindonema dana pionirino *f-ino Noll* (Kopenhago) pri la historio de la mondlingvo.

En la *Prepara Kurso por estontaj Cseh-instruistoj* partoprenis tiuj, kiuj deziris fariĝi Cseh-metodaj Esperanto-instruistoj. Estas memkompreneble, ke tian kurson povas gvidi nur vera pedagogo, kia estas f-ino Saxl. La kursanoj faris multajn provlecionojn, kiuj estis kritikataj kaj preparolataj de f-ino Saxl kaj de la kursanoj. Tiu bonvola kritiko helpis multe, kaj en la lastaj tagoj la provlecionoj pli kaj pli boniĝis.

Posttagmeze okazis belaj ekskursoj al la famaj danaj kasteloj, al la rava ĉirkaŭaĵo de Helsingór kaj al Svedujo. Carmaj estis la vesperoj, kiam nia instruistaro kaj ni kolektiĝis en la granda gimnastikejo por babili, kanti, danci kaj amuziĝi.


Dum dek tagoj ni vivis en Esperantujo. Ni sentis nin anoj de unu granda familio. Kiom amika, gaja, frateca estis la sfero!

Kiam venis la adiaŭa horo, multaj el ni havis pezan koron. Sed ni esperas reveni venontan jaron.

Al tiuj gesamideanoj, kiuj volas pasigi feliĉigan, instruatan libertempon en la nuntempe ege malmultekosta bela Danlando, mi konsilas:

Partoprenu venontsomere en la Internaciaj Kursoj de la Dana Esperanto-Instituto!

*Sveda Partopreninto.*



sumo), povas sendi sian kontribuon al la sama adreso, antaŭ la 15-a de decembro 1936. (Postĉekkonto de f-ino v. Voorthuijsen: 133688.)

*La Jubilea Komitato.*

## Ankaŭ jubileo :

**Heroldo de Esperanto eldonis sian 900-an numeron.**

La 8-an de novembro aperis la 900-a numero de la semajna organo de la Esperanto-movado: Heroldo de Esperanto, kiu de post la 1-a de oktobro estas redaktata kaj administrata en Nederlando, eldonata kaj ekspedata en Belgujo, kiel oficiala organo de Internacia Esperanto-Ligo. 900 numeroj en la daŭro de 17 jaroj certe estas rekordo de fidindeco, precipe por Esperanto-gazeto!

**Per la Hungara mono vi vivas malkare en bela Budapeŝto!**

HUNGARA GENERALA KREDITBANKO. Magyar Altalános Hitelbank, Budapeŝto, V. Dorottya u. 5. — Unu el la plej gravaj bankoj de Hungarujo, kiu de jaroj estas *entrepreno de UEA*, eldonis ofte prospektojn en Esperanto kaj nunjare ĝi estis *oficiala banko* de la budapeŝta postkongreso kaj de la Hungara Esperanta Federacio, je kiu okazo ĝi *korespondis en Esperanto* kun diversaj landoj. Por vizitantoj de la Hungara ĉefurbo ĝi ebligas per vojaĝĉekoj *ŝanĝon de fremda mono* je tre favora kurzo. Filioj kaj korespondantoj sur ĉiuj enlandaj kaj eksterlandaj merkatoj. *Perado de komerca interrilato* inter eksterlando kaj hungaraj firmaoj. Rekomendu ĝin al viaj amikoj!

**Vizitu la banejuron Budapeŝto!**

LA CENTRA KOMITATO DE LA VARM-BANEJOJ KAJ RESANIGEJOJ de Budapeŝto (KURKOMMISSION), Budapeŝto, V., Vigadóter 3, atentigas la esperantistaron, kiu dum diversaj kongresoj ekŝatis la belan «*Reĝinon de la Danubo*», la hungaran ĉefurbon, ke en tiu ĉi metropolo oni povas *dum la tuta jaro trovi sanigon, rejuniĝon, vivigojn pro la mirindaj radiumhavaj varmbanejoj*, 9 termalfontoj, 60 radiumhavaj sanigfontoj 96°—162° F, 200 glaŭber-salaj fontoj, reŭmatisma-sanigbanejoj kaj resanigejoj. Por Pengo 390,— trisemajna vivo en la plej luksaj sanigotejoj kun plena nutrado, kuracado, banado, aŭtorondveturo, trinkmono. La kolektiva bileto validas por senpaga limeniĝo, 50 %-a vojaĝrabato, rabatoj en teatroj, amuzejoj. *Entrepreno de IEL*. Prospektfolio en Esperanto. Detala prospektkajero en kelkaj lingvoj. Rekomendu al malsanaj amikoj!

**Subtenu**

**vian semajngazeton**

**« Heroldo de Esperanto » !**

## Esperanto la lingvo de Atlantiso

Nia hungara kunlaboranto s-ano P.B. sendis al ni la jenan interesan sciigon, kiun li trovis en la fama hungara ĵurnalo « Az Est »:

Interesaj gastoj venis al Budapeŝt: *Edgar Andrew Hornblow* kun edzino. Hornblow estas inspektoro de ŝtataj popol-lernejoj en Nova Zelando kaj traveturas la kontinenton per biciklo. Li estas dum studvojaĝo unujara, kiun ĉiuj novzelandaj ŝtato-ficistoj ricevas unufoje dum la oficado.

Li venis al Budapeŝt por studi la « ŝnurligskribadon », kiun oni nun oficiale instruas en la elementaj lernejoj de Budapeŝt.

« La plej praktika kunulo dum mia studvojaĝo » — diris Hornblow — « estis la lingvo *Esperanto*. Al ĝi mi dankas, ke mi konatiĝis kun la insulo Atlantiso. Antaŭ du jarcentoj dana piratkapitano kun siaj trezoroj ekloĝis sur senmaŝtra insuleto de la Atlantika Oceano, kiu devus esti ia restaĵo de la iam subakviĝinta legenda kontinento Atlantiso, lu malfrua aventurema posteulo de la piratkapitano estis s-ro *Olah Mott*, kiu trovis la insulon, ekokupis ĝin kun la tieaj trezoroj kaj sub la nomo «Atlantiso, la ideala respubliko» fondis la plej malgrandan sed plej interesan ŝtaton de la mondo. Nur dudek-kvin personoj loĝas sur la insulo, kaj la oficiala ŝtatlingvo estas Esperanto. Ili klopodas realigi la «idealan respublikon». Ĝis nun pli ol miliono da homoj petis,

ke oni akceptu ilin inter la civitanojn, sed oni ne povas plenumi la peton, ĉar la insulo estas 3000 kilometrojn for de Miami (Florido), kaj la akvorcevo sur la insulo estas limigita. La insulo havas poŝtmarkon kun la devizo: *Serĉi, vidi, kredi*. La adreson neniu scias krom poŝtoficisto en Miami. Tio estis mia plej interesa sperto ».

S-ro Hornblow faris ankaŭ lumbild-paroladojn pri Nova Zelando, montrante ke tiu lando kunigas la montaron de la Alpoj svisaj, la lagojn skotajn kaj finnajn, la marbordojn italajn, la gejserojn nordamerikajn.

Pri la nova « ŝnurligskribado » li estas entuziasmigita kaj aerpoŝte proponis al sia ministro, sendi studentojn por lerni kaj adapti ĝin, taŭgan skribadon por lernejoj « por la vivo », anstataŭ la kaligrafia skribado. Li daŭrigas sian vojon tra Bulgarujo kaj Turkujo...

La rakonto de Prof. Hornblow en la ĵurnalo « Az Est » pri la insuleto Atlantiso kaj ĝia oficiala ŝtatlingvo Esperanto sonas sufiĉe neverŝajne kaj romanece, kaj eble oni devus unue ekscii la adreson de la Miamia poŝtoficisto por ekscii de li la adreson de la esperantistaj Atlantisanoj. Certe tiu rakonto estus alloga motivo por interesa romano. Kelkfoje, tamen, la vivo estas pli romanece ol romano mem. Do, ni atendas la konfirmon pri la ekzisto de la esperantista insuleto Atlantiso

## Esperanto kaj Radio

ESTONA RADIO 10-JARA

Radio-Tallinn favora al Esperanto.

La 18-an de decembro ĉijare Estona Radio celebros sian 10-jaran ekziston. Pro tio, ke ĝi jam longtempe (ankaŭ proksimume dek jarojn) disaŭdigas ankaŭ esperantlingvan programon, estas dezirinde, ke okaze de la jubileo ĝi ricevu ankaŭ esperantlingvajn gratulojn. La adreso: **Estona Radiostacio, Tallinn, Estonio**. La gratuloj kaj salutoj estas dezirataj precipe tial, ke ĝi ne disaŭdigas Esperanto-teatraĵojn kaj amuzojn, kiuj havas signifon nur por esperantistoj, sed ĝi disaŭdigas informojn pri ekonomio, kulturo, politiko ktp., do estante en servo de praktika vivo. Kaj precipe en servo de praktika vivo internacia lingvo plenumas sian taskon, kaj nur praktikaj servoj per ĝi povas atentigi ankaŭ ne-esperantistojn pri la utilo kaj neceso de internacia lingvo.

Ĝuste nun estas konstruata nova pli potenca sendstacio (50 kw.) en **Tŭri**, kiu situas en la mezo de la lando. Ni esperas, ke tiu ĉi nova stacio daŭrigos Esperantajn disaŭdigojn, ilin dissendante pli malproksimen ol tion kapablas la nuna stacio.

J. Vahtra.

### ITALAJ STACIOJ.

Italaj stacioj deziras plibonigi la elsendojn pri turismo, kaj la Esperanto-fako deziras superi la alilingvajn disaŭdigojn. Do, bonvolu helpi ĝin! Konigu, kion vi volas aŭdi, temojn de paroladoj, kantojn, muzikaĵojn! Oni ankaŭ preparas trian radio-konkurson, sed la esperantistoj estas petataj sugesti la temon kaj eĉ proponi regularon.

### GRAVA KAJ INTERESA KONKURSO.

Norvega Esperantista Ligo aranĝas por Fremdultrafika Asocio de Oslo internacian konkurson. Kvin premioj. Petu detalojn de: Reisetrafikforeningen, Egertorvet, Oslo, Norvegujo. Ne hezitu! — Aranĝantoj de radio-dissendoj bonvolu trovi okazon por mencii la konkurson en radia dissendo! La afero estas grava por nia movado.

### RADIO SAN FRANCISCO.

Fino M. Whittan, 80 Scenic Way, San Francisco, Usono, klopodas influi la radiostacion de San Francisco disponigi tempon por Esp.-kurso. La stacio respondis, ke oni favore konsideras la proponon kaj deziras ricevi informojn pri la apliko de Esperanto en Eŭropo.

### L.V. 2, CORDOBA.

La Esperanto-parolanto deziras ricevi poŝtkartojn por subteno. Adreso: Radiostacio L.V. 2, Cordoba, Argentino.

## NI RECENZAS

**Internacia Foiro Marseille**, mediteranea kaj kolonia merkato, dum la dua dusemajno de septembro. — Tiel tekstas esperantlingva reklamo sur afiŝo (25×49 cm.) kaj sur glumarko (3½×5 cm.). Ambaŭ presajoj, diverskoloraj presitaj, estas bongustaj, efikaj kaj modernaj; certe ili bone varbis por la (12a) Marsejla Foiro, kiu okazis nunjare de la 19a de septembro ĝis la 5a de oktobro. Samideanoj, volantaj elmontri la afiŝon kaj uzi la glumarkojn por sia korespondado, petu ilin senpage de: Foire Internationale, Esperanto-Fako, 7 Quai des Belges, Marseille, Francujo.

**M. Rollet de l'Isle: Logika Esperanto — Malsimplaj formoj de la verbo.** 24 pĝ. Eldono de la aŭtoro, Paris, 35 rue du Sommerard.

La aŭtoro, s-ro M. Rollet de l'Isle, estas prezidanto de la Esperantista Lingva Komitato kaj Akademio. Sub la kolektiva titolo « Logika Esperanto » li publikigas serion da broŝuroj pri lingvaj temoj. Antaŭe jam aperis « Skribado kaj prononcado de la personaj kaj lokaj nomoj »; la priparolata volumeto estas la dua. Tiuj broŝuroj estas presataj je 250 ekzempleroj kaj senpage sendataj, laŭ peto al la aŭtoro, kiu kompanse deziras ricevi kritikojn.

Koncerne la malsimplajn formojn de la verbo, kutime nur la pasivaj formoj kaŭzas embarason pro la fakto ke en la eŭropaj lingvoj kutime ekzistas nur unu participo pasiva. Kaj el la pasivaj formoj de la Esperanta verbo, eraro plej ofte okazas pri -is -ata kaj -ita. Eraro kvankam ne tre grava sed evitebla, se oni unue « tradukas » la pasivan en aktivan formon, kaj poste uzas -is -ita nur, se la konforma aktiva formo estas -is -inta. Tiu regulo estas simpla kaj ĝenerale ankaŭ sufiĉe por la praktikulo. La ampleksaj sciencaj studoj interesas kaj utilas ĉefe al la teoriulo. La verketo de la prezidanto de nia Akademio estas tia studo, diligente ellaborita kaj ĝenerale ankaŭ prava. Mi ne konsentas pri tio ke li uzas: pasinto, venonto, por la tempoj. Se li ne volas uzi: estanteco, pasinteco, estonteco, li prefere enkonduku specialajn terminojn: prezenso, preterito, futuro. Ĉu « kurzive », aŭ « kursive »? Ĉu « la letero estos skribita » efektive egalsignifas al « la letero estas skribota »?

Samideanoj speciale interesitaj pri la teoria flanko de la lingvo, precipe pri gramatikaj demandoj, petu la broŝuron de la aŭtoro, sed poste ne preterlasu sendi al li siajn rimarkojn kaj eventualajn kritikojn. M.

**L. Friis: Esperanto-Laerebog.** — 112 pĝ. Edonis Dana Esperanto-Librejo, Thyrasvej 15, Aabyhøj. — Tre klara preso, jam la 3a eldono, kaj malalta prezo: nur 2 dan. kr. Do, rekomendo sufiĉa!

**Dr. Emil Pfeffer: Ich spreche Esperanto!** Einführung in die Esperanto-Konversation. — Tagblatt-Bibliothek Nr. 426. — 56 pĝ. — Eldonis: Steyermühl-Verlag, Wien I. Prezo 52 groŝoj aŭ unu respond-kupono.

Libreto laŭ speco de la kutimaj konversaciaj libroj. Kaj tamen ne tute sama. Kelkaj konversacioj pli vere estas artikoloj aranĝitaj en formo de interparolo. Utilaj estas la jen kaj jen aldonitaj lingvaj klarigoj.

La ĵus aperinta libreto estas ekzemplero jam de la dua eldono (6-8000). La fakto, ke la unua eldono de la libreto rapide elĉerpigis, estas ĝia plej bona rekomendo.

# Kristnasko-Festo

## ĉe diversaj popoloj

Kristnasko! Festo de amo, paco kaj konkordo! La plej feliĉiga kaj ĝojiga festotago de la kristanaro.

« Pacon sur tero al ĉiuj bonvoluloj »: De l' preĝejoturo tintas la sonoriloj, tra la fenestroj de l' domoj brilas la lumaj kandeloj de la kristnaska aro, ĉirkaŭ kiu ariĝas la gaja infanaro.

En la provinco, la kamparanoj de la vilaĝoj meznokte kun lumaj lanternoj migras tra la glacia nokto al preĝejo, por ĉeesti la noktomezan meson. La multaj kandeloj de la sanktejo brilas solene, kaj la orgeno sur la ĥorejo muĝsonore akompanas la multajn voĉojn, kiuj kantas la kristnaskan psalmon al la gloro de l' Savinto, naskiĝinta en stalo de Betlehemo.

Por la festonado de la poezi-plena Kristnasko, la *abio* estas la ĉefa simbolo. Speciale la infanoj pensas ĉe mencio de la Kristnasko-Tago tuĵ pri la brila, ornamita arbo.

De kiam la bela kutimo de starigo de kristnaska arbo originas, oni ne povas ekzakte konstati. La unua scio pri ornamita arbo devenas el Strasburgo el la jaro 1605; sed tiam la pinglarbo ankoraŭ ne portis kandletojn, sed nur multkolorajn paperrozojn, pomojn kaj sukeraĵojn. Alia informo en verko de Wittenberg'a juristo *Gottfried Kissling* « Von heiligen Christ Geschenken » (1737) raportas pri abio kun kandletoj, kaj samtempe ni ekscias, ke en Zwickau oni tiam kutime por ĉiu familiano ornamis apartan arbeton, Ekde la mezo de la 18-a jarcento, la mencioj pri kristnaska arbo estas pli oftaj. En la unua triono de la 19-a jarcento, la pinglarbo estas enkondukata dum Kristnasko en Danujo, Norvegujo kaj Svedujo. Ĉirkaŭ 1830 oni renkontas ĝin en tuta Germanujo kaj en la ĉefaj partoj de la germanlingva Aŭstrio. Proksimume je 1840 la Kristnaskoarbo estas propagadata en Anglujo de la edzo de imperiestrino Viktoria. Unue en Londonaj rondoj, ĝi estas adaptata por Kristnasko-festo iom post iom ankaŭ en la loĝejo de simpla homo. Je la fino de la sesdekaj jaroj de pasinta jarcento ĝi fine trovas ĝeneralan enkondukon ankaŭ en Francujo.

La solenon de la Kristnasko-tage okazigas ĉiu popolo laŭ sia speciala maniero.

Kristnasko ĉe la *angloj* estas antaŭ ĉio abunda festonado. Jam delonge oni ŝparegis por tiu ĉi grava okazaĵo, pacience plenigis sian « christmas-box » (kristnaskan ŝparujon) monaton post monato, por malavare elspezi nun ĝian enhavon. Dum la festotago de Krist-

nasko, oni konsumas multege da birdaĵo kaj pudingo, oni feliĉigas la infanojn per ludiloj kaj frandaĵoj, oni interŝanĝas donacojn kaj gratulojn kun parencoj, amikoj kaj konatoj, dancas kaj kisas sin reciproke sub la branĉo de visko. Cetero la ĉarma kutimo de la kristnaska kisado neniam transiras la kadron de bonmaniera konduto. La tradicio postulas, ke la sinjoro, kiu tuŝis per siaj lipoj la frunton aŭ vangon de fraŭlino aŭ sinjorino — egale ĉu ŝi estas juna aŭ ne — donacu paron da belaj gantoj; se li la konsentitan kison sub la viska branĉeto ne rekompencus per tia donaco, li ne plu havus la rajton, esti taksata kiel ĝentila homo.

Post kiam la kristnaska, vespera festonado estas jam sufiĉe progresinta, la junularo aranĝas ludon, nomatan « Snap dragon » (buŝkaptu la drakon): Sur la tablon estas metata plado da sek.-vinberoj, kiujn oni per konjako surverŝas kaj ekbruligas. La ĉirkaŭsidantoj devas el la flamoj perfingre kapti la sekajn vinberojn, por ilin manĝi.

Kristnasko en *Skandinavio!* Dumtage antaŭ la « Sankta Vespero » oni en ĉiuj domoj balaas kaj purigas. En la vendejoj estas aĉetataj manĝaĵoj ĉiuspecaj kaj donacoj. Vespere ĉiuj familianoj estas hejme. La per blanka tuko kovrita tablo estas heligata per diverskoloraj kandeloj. En angulo de l' ĉambro troviĝas la kristnaska arbo, belege ornamita.

En sveda hejmo, dum Kristnasko du manĝaĵoj estas tipaj: kuirita moruo kun terpomoj, kaj per lakto surverŝita kaĉo el rizo, sur kiun oni ŝutas sukeron kaj cinamon. En kamparanaj familioj krom tio kuirita porkokapo kun ruĝa pomo en la buŝo ornamas sur granda telero la festotablon.

Post la festmanĝado oni forportas la manĝobezonaĵojn, kaj la kristnaska arbo kun la lumantaj kandletoj estas starigata en la mezon de la ĉambro. Kantante, la tuta familiano dancas ĉirkaŭ la arbo. Sed jen eniĝas en la ĉambron altkreska viro kun longa barbo kaj masko sur vizaĝo; Estas la kristnaska viro. El granda korbo li disdonas al ĉiu iun donacon. Kia ĝojo estiĝas: Kiel feliĉe sentas sin antaŭ ĉio la infanaro!

Frumatene de la sekvanta tago oni iras al preĝejo. Solene ludas la orgeno, oni kantas psalmojn, kaj la pastro predikas pri paco.

Alveninte hejme, oni komencas boue manĝi: ŝinkon, panon el tritiko, varmegan rizon kaj hispanan vinon. Matene de la 25-a de decembro, tute proksime de la kamparanaj domoj aŭdiĝas laŭta

# La ruza vulpo.

(Fablo.)

Lia moŝto, Leono la reĝo, foje estis tre malbonhumora. Tial li invitis siajn korteganojn por distro.

Ili rigardis la kavernon, kiu estis la reĝa palaco, sed ĉiam ili kovris la nazojn per mano aŭ naztuko kaj ĉiam ili kaŝe flustris. En la anguloj kuŝis amasoj da ostoj, pecoj de putra viando kaj alia malpuraĵo, kaj de tie disvastiĝis terura malbonodoro.

La reĝo, kiu observis la senrespektan konduton de sia sekvantaro, demandis la azenon: « Cu io ne plaĉas al vi en mia palaco? »

« Ho reĝo! Pro la malbonodoro de tiu sterkaĵo mi apenaŭ povas spiri... »

Post tiuj malrespektaj vortoj la leono sin ĵetis al la azeno kaj disŝiris ĝin je pecoj.

Poste, turnante sin al la vulpo, la leono ordonis: « Nun diru vi malkaŝe opinion vian! »

Sed la vulpo, ruzulo, denove premis sian tukon antaŭ la nazon, ternis kelkajn fojojn kaj respondis per malklara voĉo: « Pardonu, reĝa moŝto... tsi... pro mia nazkataro... tsi... mi vere ne povas diri ion... tsi... pri la speco de tiu odoro... »

Libere rakontis:

Eduard Sykora, Wien.

pepado de birdoj: oni dismetis por ili sur la firsto de l' tegmentoj grenogarbajn, la restaĵojn de la rikolto, kiujn oni speciale tiucele konservas.

Tute alinaniere Hispanujo festas Kristnaskon. Je « Sankta Vespero » oni kantas malnovajn kristnasko-kantojn, t.n. « Villancejos ». Ĉe la « virkoka meso », kiel oni tie nomas la noktomezan meson, gaja muziko eksonas, kiu preskaŭ aŭdiĝas kiel dancmelodio, akompanata ofte eĉ per kastanjetoj. Dum la festmanĝado, kiu poste sekvas, oni konsumas migdallaktan supon, bramojn (tre bongustan specon de fiŝo), ruĝajn betojn (rapojn), kaj meleagron plenigitan per pomoj kaj piroj.

En *Rumanujo* la tagoj antaŭ la Kristnasko-festo havas severan karakteron; oni multe fastas, aŭ detenas sin almenaŭ de la konsumo de viando, ovoj kaj farunaĵoj. Sed des pli abunda estas la festonado dum Kristnasko: oni bakas grandegajn kukojn kun enhavataj migdaloj, nuksoj, spicaĵoj, rumo kaj papavo-greneretoj. En la kristnaska nokto infanoj kiel « tri sanktaj reĝoj » migras kantante de domo al domo; sed kutime estas pli ol tri: kvin ses aŭ eĉ pli multaj infanoj, kiuj antaŭportas stelformajn lampojn kaj aŭdiĝas kantojn de naiva simpleco. Rekompence ili ordinare ricevas nuksojn kaj lunforman bakajon. Dum la noktomeza meso, la pastro legas la 12 evangeliojn, kaj la popolo surgenuiĝas dekdu-foje, por ilin aŭskulti.

« Pacon sur tero al ĉiuj bonvoluloj! » Kiel iam la stelo de Betlehemo gvidis la homojn de bona volo, tiel la Verda Stelo de l' Espero montru ankaŭ al ni la vojon al pli bonaj tempoj...

R. Seebacher.

## La viro kiu nokte veturis al tombejo

Sinjoro Thomasius estis enteriginta sian bopratinon, kiu ne loĝis en la sama urbo. Pro tio Thomasius devis fari mallongan vojaĝon.

Do li revenis je noktmezo. Iomete ebria — la cilindran ĉapelon malrekte sur la kapo — sed cetere: feliĉa.

Malrapide Thomasius trotis tra la stacidomo kaj ekstere eniris la tramon. Estis la lasta vagonaro, kaj pro tio ĝi estis treege plenigita de pasaĝeroj. Thomasius per siaj kubutoj batalakiris sidlokon.

Apud li troviĝis sinjorino, kaj kontraŭe de li granda, eleganta sinjoro kun dikaj okulvitroj. Liaj okuloj preskaŭ borĝis en la ĵurnalon, kiun li tenis etendita antaŭ si per maldikaj manoj bone flegitaj. Oni facile povis rimarki, ke tiuj okuloj apartenas al viro plenenergia.

«Kredeble pli frue li estis leŭtenanto», pensis Thomasius.

La kontrolisto alproksimiĝis, kaj Thomasius havis grandegan penon por eltiri sian monujon el sia pantalonpoŝo. Pro ĉi tiu movo la cilindra ĉapelo glitis de sur la senhara kapo de Thomasius, malrapide ruliĝis trans la ĵurnalon de la kontraŭsidanto kaj fine metiĝis sur ties genuojn.

«Pardonu!» balbultis Thomasius, kaj la eleganta sinjoro murmuris ion nekompreneblan, dum li nevole redonis la cilindran ĉapelon al ĝia posedanto.

Nun ĉeestis la kontrolisto kaj demandis: «Kien?»

«Al — hup — la tombejo!» — Ĉu al la tombejo? Kion tie nokte volas fari ĉi tiu viro? La pasaĝeroj atentiĝis! — «Nun, noktomeze, viro veturas al tombejo?» — «Nekompreneble! — Vere, plej nekompreneble!»

Precipe la sinjoro kun la dikaj okulvitroj ekaŭskultis, kaj ankaŭ la sinjorino.

Sed la kontrolisto ŝajne konante ĉi tiun specon de pasaĝeroj ridetis kaj denove demandis: «Kien, mi petas?»

«Nu — hup — kiel dirite — hup — al tombejo!» respondis Thomasius, kiu nun iom ekscitiĝis kaj pro tio nun pli forte singultis.

La sinjorino apud li ekinsultis; sed la eleganta kunveturanto ŝin trankviligis kaj sin turnis al la kontrolisto:

«Priservu unue la ceterajn personojn! Mi intertempe parolos kelkajn energiajn vortojn kun tiu cilindra onklo! Tian specon de homoj mi pli bone konas ol vi! Mi do ĝustigos lin! — Ja jes!»

La kontrolisto malproksimiĝis, kaj la sinjoro nun sin turnis al Thomasius:

«Viraĉo! — Koncentru viajn pensojn! — Vi — vi ebria...»

En ĉi tiu momento la cilindra ĉapelo de sinjoro Thomasius denove komencis minace gliti kaj fine en beleta kliniĝo

falis sur la genuojn de la sinjorino. Pro tio ŝi terurite eksaltegis! Sed la eleganta sinjoro denove sukcesis trankviligi ŝin.

Des pli indignite li alparolis Thomasius'on:

«Mizera viraĉo! Ne ja tedu la kunvojaĝantojn!... Cetere — kion vi volas fari sur tombejo nokte je la unua horo? — Respondu!»

Thomasius rigardaĉis al la okulvitroj, malantaŭ kiuj lin alflamis koleraj okuloj. Kun peza lango li diris:

«Tie min atendas — hup — mia edzino!»

«Kiel?!?!» — Nun ankaŭ la eleganta sinjoro eksaltegis, kaj same la krieginta sinjorino. — Ĉiuj pasaĝeroj nun atentis kaj plilongigis siajn kolojn por vidi tiun viron volantan nokte veturi al tombejo.

Intertempe la sinjoro denove sidiĝis. La okulvitrojn flankŝoviĝintajn ĉe la saltego li rektigis kaj longtire demandis:

«Via edzino — vin — atendas — tie?»

«Jes!» respondis Thomasius, kaj la cilindra ĉapelo nun tie forte moviĝis, ke ĝi falis sur la plankon de la vagono! Tiumomente la kontrolisto revenis kaj paŝis sur la bedaŭrindan cilindran ĉapelon, kiu mizere enkliniĝis.

Thomasius skrapis sian senharaĵon kaj pene balbutis:

«Ne — hup — malutilas! Ĉi tiu ja estas — hup — *chapeau claque!*»

Lia eleganta kontraŭulo tamen nun plene perdis la paciencon kaj ekkriegis:

«Mizerulo!! — Ne parolaĉu tiel!... Kion — vi — nokte volas fari sur tombejo... kaj kial vin atendas tie via edzino? — He?!»

Thomasius reprenis kaj ree surmetis sian cilindran ĉapelon kaj diris:

«Ne nur mia edzino — hup — tie atendas, sed ankaŭ miaj infanoj!»

«Frenuzulo!!» ekkriegis la sinjoro. «Frenuzulo!!»...

Ĉi tiu vorto sufiĉis por kaŭzi panikon inter la pasaĝeroj kiuj jam estis timigitaj pro la interparolado de la du viroj.

Oni plej terure bruegis kaj potencege sin pelis al la elirejoj.

«Frenuzulo!!! — Mortigulo!!! — Li jam deliras!!!»

Per ĉi tiu tumulto Thomasius malebriĝis.

La kontrolisto nun ankaŭ provis eligi Thomasius'on el la vagono, kiun li intertempe haltigis. Thomasius ne kontraŭis; ĉar rigardo tra la vagonfenestro lin certigis, ke la tramo atingis la straton kondukantan al la tombejo. Tre subite li estis ekstere!... Falegante, la kontroliston li estis kuntirinta el la vagono. Ankaŭ la tramkondukisto aliris.

Thomasius rapide forkuris, ĝis kiam li estis ekster la kontrolistaj manoj. Tiam li kriis al la du oficistoj:

«Por ke vi sciui — La veturprezon vi neniel ricevos de mi! — Kaj kial mi veturis al la tombejo, ankaŭ tion vi sciui: Mi nome estas la *tombeja ĝardenisto* kaj tie mi jam de longe loĝas!! — Bonan nokton!...»

## Vintrohelpe en Polujo

Satigi la malsatulojn,  
vestigi la nudulojn!

De la momento, kiam la senlaborulaj vicoj ĉesis malkreskadi, pasis kelkaj jaroj kun sama nombro da vintroj. En niaj malvarmaj landoj, la vintro estas speciala malamiko de la malriĉuloj, — tial, kiam la vintro komencas alproksimiĝi, oni devas pensi pri helpe por tiuj malriĉuloj, por ilin iel ajn satigi kaj vestigi.

Ankaŭ en la pasintaj krizojaroj la pola popolo devis pensi kaj pensis pri la senlaboruloj; sed en tia grado kaj tia formo, kiel oni komencis organizi la vintrohelpon en Polujo nunjare, ne estis antaŭe konate.

Jen, en salonego de la ŝtatprezidenta rezidejo, — en ĉesto de la ŝtatprezidanto, de generalo *Rydz Smigly*, la ĉefministro, pluraj ministroj, la ĉefepiskopo, senatanoj, parlamentanoj, pluraj reprezentantoj de la industrio kaj komerco k.t.p. — okazis kunveno de t.n. Tutpola Komitato por Helpe al la Senlaboruloj.

Malferman paroladon faris la ĉefministro, difinante la celon de la Komitato, kiu estas: «Satigi la malsatajn kaj vestigi la nudajn».

Longan paroladon faris poste la ministro por sociala protekto, *M. Zyndram Kościakowski*, kiu prezentis la malfacilajn vivkondiĉojn de la senlaboruloj en Polujo.

Ĝis nun, la senlaboruloj plej ofte estis balasto je siaj familioj, kiuj devis ilin nutri. Okazis multfoje, ke en unu familio la senlaboruloj estis pli multaj ol la laborhavantoj. Tio kaŭzis, ke la vivnivelo de tiaj familioj malaltiĝis ĝis preskaŭ nebla minimumo, kaj la laboristaro, kiu devas vivteni la senlaborulojn, vivas en kondiĉoj tute neimageblaj. Tiel do, sole la laboristoj devis teni la rezultojn de la krizo; la aliaj klasoj, havantaj, ne estis ŝarĝitaj de tiu balasto.

Kaj nun — daŭrigis la ministro — kiam proksimiĝas la vintro, «oni devas antaŭvidi, ke la nombro de la registritaj senlaboruloj superos 500.000, kaj konsiderante la alfluo de junaj laborfortoj kaj reenmigrantoj el Francio kaj Belgio, — tiu nombro povas atingi 600.000 personojn.»

«Ĉiu tago proksimigas nin pli multe al la momento, kiam sur la fenestrojn de la senlaboruloj ekfrapos la malvarmo kaj malsato. La proksimiĝanta vintro

## Letero el Svedujo

(Laŭ komunikoj de Sved-Internacia Gazetservo.)

Oni faras preparojn por celebri la *tricentjaran jubileon* de la starigo de sveda kolonio en Ameriko, kiu okazis per enlokiĝo en regiono, nun estanta la ŝtato Delaware. Kiel sendependa kolonio la sveda loĝantaro ne povis longe ekzisti pro la forto de la nederlandanoj kaj devis kapitulaci; poste la nederlandanoj devis mem submetiĝi al la angloj. Sed kvankam la sendependeco de la svedaj koloniistoj tiel malaperis, la koloniistoj mem restis en siaj lokoj, kaj en la fino de la 17-a jarcento troviĝis en Delaware almenaŭ mil sveddevenaj familioj.

Multaj el la posteuloj de tiuj frutempaj koloniistoj famiĝis en Usono, kaj deveno de la unuaj svedaj ekloĝintoj en Nova Anglujo estas taksata preskaŭ same alte kiel deveno de tiuj kiuj transveturis per « Mayflower ».

Unualoke Delaware interesiĝas pri la jubileo, sed la usona registaro aliĝas al la celebrado. Laŭ invito de la usona registaro ankaŭ Svedujo estos reprezentata, kaj oni nun preparas detalan planon por la celebrado.

\*

estos des pli malfacila, ke dum la krizaj jaroj konsumiĝis ĉiaj provizoj. El la 600.000 senlaboraj familionutrantoj, nur ĉirkaŭ 100.000 rajtos al senlaborula helpo, — la resto estos senhelpa, tio signifas, ke 500.000 familioj estos sen helpo kontraŭ la malvarmo kaj malsato. »

Per tiaj kaj similaj vortoj ministro Kościakowski prezentis la preskaŭ tragedian staton de la senlaborulaj familioj, kaj poste li konkludis: « Ni ĉiuj respondecas pri tio, ke la malsato kaj frostoj ne elŝiru el la senlaborulaj vicoj eĉ unu vivon, por ke la senlaboruloj trovu zorgemon kaj protekton flanke de la tuta popolo, ke ili eltenu la malfacilegan tempon, — ĝis kiam la suno de propra laboro kaj gajno refoje ilin varmigis... »

La Organiza Komitato sub la protektorato de la ŝtatprezidanto kaj generalo Rydz Śmigły, jam komencis sian laboron. Ĉiuj institucioj kaj unuopaj personoj respondis ĝian alvokon per ofero de grandaj monsumoj. Samtempe oni organizis helpon per oferoj en naturaj produktoj, kiu ankaŭ jam montras bonajn rezultojn.

Sed... malgraŭ tiuj bonaj rezultoj, skeptikulo povus demandi: « Ĉu tio sufiĉas, — ĉu libervolaj oferoj sufiĉas por satigi kaj vestiĝi 500.000 familiojn dum la tuta vintro? »

Henriko GIELB.

Terura *vintra tragedio* en la nordsveda montaro antaŭ pli ol du cent jaroj estas memorigita per trovo de amastombo, kie estas enterigitaj ses cent svedaj soldatoj frostmortintaj en januaro 1719. Restaĵo de sveda armeo apartenanta al la famaj trupoj de la sveda heroreĝo, Karlo 12-a, kaj sub komando de grafo Gustav Armfelt, retiriĝis en tiu jaro de Norvegujo al Svedujo tra la solecaj montodistriktoj de Jemtlando kaj estis tiam surprizata de forta neĝoŝtormo kaj intensa malvarmo. La viroj estis jam elĉerpitaj pro penado kaj malfacilaĵoj, kaj pluraj miloj da soldatoj frostmortis. La restanta parto de la armeo atingis la malgrandan montovilaĝon Handöl, sed la brakoj, kruroj kaj piedoj de la soldatoj estis grandparte frostintaj, kaj tiel ne malpli ol ses cent viroj mortis tie kaj estis enterigitaj en amastombo. Iu postvivanta armea kirurgo skribis en raporto, ke oni devis fari tiom da amputoj, ke la fortranĉitaj membroj plenigis plurajn barelojn.

La tragedio estis ĉiam konata en la kronikoj de la sveda armeo, sed la tombo, kie estis enterigitaj la mortintaj soldatoj, ne estis trovita ĝis nun. Ostoj, kranioj, uniformrestaĵoj, regimentaj butonoj kaj aliaj vestobjektoj estas trovitaj en la tombo, sur kiu oni nun starigos simplan monumenton por memori unu el la plej maldolĉaj okazoj en la historio de la sveda armeo.

\*

Sveda *senlaboreco* daŭre reduktiĝas. Laŭ la lastaj raportoj la senlaboreco en Svedujo dum la sep unuaj monatoj de la nuna jaro malaltiĝis per ĉirkaŭ 40.000 (de 61.400 en januaro ĝis 21.500 en julio). La sammonata cifero por 1935 (julio) estis duoble tiel alta, nome 42.582. El la serĉantoj de senlaborula subteno pli ol 80 procentoj ricevis helpon de iu speco. La elspezoj de Ŝtata Komisiono por Senlaboreco post la komenco de la jaro estas ĉ. 26,4 milionoj da kronoj.

\*

Nun aperintaj ciferoj rilate al konsumo de diversaj artikoloj en Svedujo dum 1935 montras, ke la *popolo fariĝis konsiderinde pli sobra* post la komenco de la nuna jarcento. Meznombro la konsumo de alkoholtrinkaĵoj kaj biero dum la kvinjara periodo 1901—1905 estis respektive 7,6 kaj 32,6 litroj por ĉiu loĝanto. En 1935 la respondaj ciferoj estis 4,3 kaj 21,1 litroj. En la sama periodo de 35 jaroj la konsumo de kafeo por ĉiu loĝanto kreskis de meznombro 5,6 kg en 1901—1905 ĝis 7,8 kg. en 1935 Oni konstata ke la svedoj nun estas la plej grandaj kaftrinkantoj en Eŭropo. Eĉ teo montras kreskon de 0,04 kg. al 0,07 kg. Konsumado de tabako restis neŝanĝita, malgraŭ la nuna cigaredfumado de viinoj.

## Du poemoj

de Mieczysław Braun.

(El pola originalo esperantigis la aŭtoro.)

### La geometroj

Mi estas A, vi estas Bo,  
Du punktoj en spac' eterna.  
Lini' kunigas nin A kaj Bo  
En la simpleco eterna.

Malpovas esti aliaj — jen  
La sola, rekta en ĉio  
Geometria ĥora faden'  
Nedisigebla Linio!

Ĝia duono — Radi' de l' mond' —  
Du manoj trans la aero.  
Ĉirkaŭe kreskas kontur' de l' Rond'  
Super la vivmistero!

La Rond' sopiras kaj kreskas nun,  
La sango bolas en vejnoj.  
La Rondo iĝas lumanta sun'  
Super plej kara hejmo!

### La baterio

Kunmetinte la zinkon kaj kupron kun fero,  
Mergu ĝin en acidon kaj en ĉi-momento  
Ekvibras miraj ondoj, transsaltos fajrero,  
Zigzage elvokita per fort' elementa.

Same vorton kunigu kun alia vorto,  
Humidigu en sango, fandigu en flamo,  
Ekprovu kiel ŝtalon per fajro kaj forto, —  
Tuj ekbrilos versaĵo, naskita de l' amo.

De l' simplaj elementoj diversaĵo plia  
Enhavas la fortegon, ĝi vekiga ĥanta,  
Kurante fluas ĥoren la ond' poezia,  
Samkiel la elekto vibranta, vibranta...

## Rido Sanigas

Miskompreno.

Sinjorino ludas bridĝon. Diras iu: « Ĉu vi jam vidis la novan Muriljon (\*), kiun aĉetis la urba administracio? ».

Respondas alia: « Ne, jam de monatoj mi ne vizitis la Zoologian Ĝardenon. »

(\*) Murillo (prononcu: Muriljo) estis fama hispana pentristo.

Monujo kaj orelo.

Kurto kaj Karlo, du friponoj, sidas unu apud la alia en teatro. Dum la prezentado Kurto forŝtelas de Karlo ties monujon. Sed Karlo rimarkis la ŝtelon en la lasta momento. Li lerte fortranĉas unu orelon de Kurto. Kurto krias:

— Mia orelo, mia orelo!

Karlo krias:

— Mia monujo, mia monujo!

— Jen la monujo!, diras Kurto.

— Jen la orelo!, respondas Karlo.

Strange!

Post Esperanto-kurso en knaba klaso de nederlanda lernejo okazas ekzameno. La ekzamenanto donas kalkultaskojn.

— Kiom estas kvinoble tridek-ses?

— Strange! ekkrias unu el la knaboj; tute la sama rezulto, kiel se mi farus ĝin nederlandlingve!

Ho, tial!

Edzo, kiu ofte bastonbatas sian edzinon, duafoje edzinigintan, surprizas ŝin preĝantan por lia sano.

— Kiel?, li demandas; ĉu vi tiom amas min, kvankam mi bastonbatas vin?

— Neniel!, ŝi respondas; tio estas nur tial, ĉar mia unua edzo vangofrapis min, vi min bastonbatas... Se vi mortus, mia tria edzo certe mortigus min!

# LA ESPERANTISTA REKLAMO

## La prezo de anoncetoj

estas egalvaloro de 10 belgaj frankoj aŭ 0.62 ned. guldeno, por la unuaj 20 vortoj aŭ mallongigoj; por ĉiuj pliaj 10 vortoj komencitaj po 5 belgaj frankoj aŭ 0.31 guldeno. La anoncetoj aperas en la semajna kaj monata organoj de Internacia Esperanto-Ligo, nome en *Heroldo de Esperanto* kaj *Esperanto Internacia*. Por mendi anoncetojn, oni turnu sin al la Administracio de *Heroldo de Esperanto*, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando; nederlanda poŝtĝiro 1306.30 ('s-Gravenhage); belga poŝtĝiro 2044.04 (Bruxelles).

**30 progresintoj** deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. Respondo garantiata. Skribu al: Hilde Veitenhanse, Radhusgatan 40 a, Nässjö, Svedujo.

## 560 Glumarkoj.

Tekstoj: « Esperanto korespondanta », « Esperanto, lingvo internacia » por hgl. 0.50 afrankite (eksterlandan 4 respondukuponoj).  
H.-E.O., SOESTERBERG — (Nederlando).  
Poŝtkonto: 8 8 0 1 5

**Internacia Katolika Informejo.** — Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika kredo, senpage povas ricevi ilin de **Fr. M. Monulfus**, sekretario de l' Internacia Katolika Informejo, Instituto S-ta Nikolao, Oss, Nederlando. (310)

**Artikolojn pri sociala situacio de laborantoj en komercaj entreprenoj** bezonas por faka ĉeĥoslovaka gazeto V. Savel, komercocifistoj, Rybnický 5, Strašnice, Praha, Ĉeĥoslovakio. — Ĉiu helpu laŭpove kaj alsendu detalajn artikolojn pri la vivo de komercaj laborantoj en via lando! Se via artikolo estos publikigita, vi ricevus pruvekzemperon.

**Danko.** — Mi dankas s-ron Carl Walter, aŭtoron de la « Gaja Lernolibro », pro la agrabla gvidado tra Berlin dum mia tiea restado. S-ro W. montris al mi vidindaĵojn, kiujn mi ne estus vidinta sen lia helpo. Cetera s-ro W. certigas, ke la germanaj esperantistoj estas pretaj, gvidi kaj helpi al eksterlandaj esperantistoj, kiel ĝis nun. P. Th. Justesen, Fannerup, Danujo.

« **Nia Batalado** », 100-paĝa ilustrita libro pri Litovujo kaj ĝia ĉefurbo Vilnius, estas senpage sendata al ĉiu petanto. Skribu al: « Vilniui Vaduoti S-ga », Kaunas, Litovujo. (365)

**Esperanta Kantokolekto**, notoj, tekstoj kaj ilustraĵoj, prezo 25 nederl. cendoj. — Mendebila ĉe la eldoninto s-ro J. H. Vink, Amsterdamschestr. 23, Scheveningen, kaj ĉe Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando. (366)

**Ne dissplitigu la fortojn!** Aŭtuna propagando estu ĉie komuna: atentigi, instrui ĉefe ĉe **skoltoj**, kiuj iros en 1937 al la **mond-tendaro** en Nederlando! Legu la artikolon de Nico Hoen en « Esperanto Internacia » n-ro 2! Kunagu! La komuna celo: akiri la junularon! — Skolta Esperantista Ligo, 54 Constable Road, Ipswich.

**Perth** (Okcidenta Aŭstralio), s-ro E. Walker, P. O. Box 391, deziras korespondi kaj interŝanĝi aer-poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj. Certe respondas.

## URĜA ALVOKO:

Koncentrigu la laboron! Ĉiulande **nun atentigu la skoltojn**, kiuj en somero 1937 iros al jamboreo en Nederlando, ke ĝis tiu tempo **ili lernu Esperanton**; jam multaj nederlandaj skoltoj lernas.

« Skolta Bulteno » publikigas adresojn de skoltkorespondemuloj. Adreso: 54 Constable Road, Ipswich (Suffolk), Anglujo. (367)

**Kiun interesas lumbild-diapozitivaj pri Esperanto?** — Por propagand-paroladoj, sur normal-kinofilmilo. Skribu al Hungara Skolta Esperanto-Rondo, Nagy Sándor u. 6, Budapest V, Hungarujo. Ĉe konvencnombra mendo la prezo de unu serio estos proksimume 7 sv. fk. Efikigu viajn propagand-paroladojn!

**Poŝtmarkojn** ĉeĥoslovakajn en paketoj kaj serioj interŝanĝas kontraŭ eŭropaj kun seriozaj filatelistoj Marta Körnerová, « Filatelie », Trebíč, Starečka, Ĉeĥoslovakio. Respondo garantiata. 368

**Gesamideanoj tutmondaj!** Bonvolu tuj sendi al ni propagandmaterialon (afiŝojn, leterojn, gvidlibrojn, ĵurnalojn, gazetojn, flugfoliojn ktp.) esperantlingvan por verb-ekspozicio. Antaŭdankon! Ni rekompencos per poŝtkartoj ilustritaj. — Vejle Esperanto-Klubo, Chr. Bertelsen, Svendsgade 29, Vejle, Danlando.

**Samideano August Eigner, Wien XII, Schönbrunner Strasse 262, Aŭstrio**, volonte sendas la plej diversajn muzikaĵojn por **Esperanto-koncertoj** (kantojn, tekst-valsolojn, melodramojn ktp.). Li nur postulas kompenson por la poŝtelspezoj.

**Poŝtmark-kolektantoj!** Mi interŝanĝas poŝtmarkojn laŭ Michel aŭ Yvert 1937. Afranku filatele! Respondo garantiata. S-ro Oscar Appel, Timmero, 369, Boxholm, Svedujo.

**Letervespero** okazos la 15 decembro. Sendu leterojn, bildkartojn ktp. al: Ostenda Grupo Esperantista, Christinestr. 57, Oostende, Belgujo. Ni garantias respondon.

**Mi deziras korespondi** kun gesamideanoj en la tuta mondo. Esperantlingve per poŝtkartoj aŭ leteroj. Mi certe respondos. S-ro Albert Johansson, Järnagatan 3, 4 tr., Södertälje, Svedujo.

**Mi estas 28-jara fraŭlo**, kiu deziras korespondi kun gesamideanoj en la tuta mondo. Certe respondos. Nils Sandberg, Berggatan 25, Orebro, Svedujo

**27-jara fraŭlo** deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn kun gesamideanoj en la tuta mondo, ankaŭ en Svedio. Respondos al ĉiuj. Olov Eliasson, Solgatan 5, N. Hagaby, Orebro, Svedujo.

**Sveda 19-jara fraŭlino** deziras korespondi per poŝtkartoj kun samideanoj en ĉiuj landoj. Skribu al fino Maja Olsson, Ulvstorp, Svedujo.

**Verdstela Frataro**, GEL-grupo en Zwittau/Svitavy, akceptas proponojn pri interŝanĝo de poŝtkartoj, poŝtmarkoj, kaj fotoj. Demandojn respondas la grupestro K. Karger, 47, Margareten, Zwittau, Ĉeĥoslovakio.

**Sveda junulo** deziras korespondi kun gejunuloj tutmondaj france, angle, germane, esperante. John Söderholm, Rådmanngatan 57, II., Stockholm, Svedujo.

**Ses gesvedoj** deziras korespondi kun gesamideanoj ĉiulandaj. Bonvolu respondi al « La Verda Stelo », Esperanto-klubo, adr.: H. Forslund, Box 57, Uddevalla, Svedujo.

**Sveda verkisto** deziras korespondi kun eksterlandaj samideanoj pri idealaj aŭ lingvaj temoj. S-ro A. Tenglet, Stäket, Svedujo.

**Voronej**, Sovet Unio, A. Stoletov, ul. St. Razina 32, korespondas pri literaturo, teatro, kino, ankaŭ kun geknaboj.

**Interŝanĝi poŝtmarkojn** kun ĉiuj landoj laŭ Michel deziras Rudolf Grepp, Mäksa p.ag., Estonio. Ne sendas unue.

**Sveda knabo** deziras korespondi kun samideanoj. Per Sjöberg, Box 51, Brevens bruk, Kilsmo, Svedujo.

**Kelkaj junaj gesperantistoj** deziras korespondi kun gesamideanoj el ĉiuj landoj. Ni certe respondos. Mats Högström, Box 275, Långshyttan, Svedujo.

**Korespondo.** — Kun nekonataj amikoj kaj amikinoj en ĉiuj landoj 27-jara fraŭlo deziras korespondi. Adreso: Tage Raflund, Rönninge, Ronneby, Svedlando.

**27-jara fraŭlo** deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn kun gesamideanoj el la tuta mondo. Respondo al ĉiuj. S-ro Erik Wahlgren, Bondegatan 39, Stockholm, Svedujo.

**Granda Letervespero** la 1-an de januaro 1937: La gesamideanoj el Esperantujo bonvolu helpi, sendante tuj, se eble, leteron aŭ poŝtkarton por konvinki la 250 novajn samideanojn de mia urbo kaj ĉirkaŭaĵo, kiujn ni ĵus sukcesis esperantistigi; eventuale ĉiu esprimu sian propran deziron pri korespondado aŭ interŝanĝado! Tiamaniere mi ne estos vane predikinta pri la utileco de Esperanto, kaj ĝia lernindeco estos pruviata. Respondo certigata. Adreso: S-ro Polydore Stappers, por Esperantista Letervespero, Eigenaarstr. 42, Turnhout, Belgujo.

**Helpu, tutmondaj esperantistoj!** alporti freŝan vivon al nia aranĝota en decembro **Ekspozicio**, per rapidega alsendo de valora, interesa propaganda materialo. Danke akceptos ĉion: F-ino Minuška Mantel, sekretariino de Societo « Esperanto », ul. Janowska 109, Lwów, Pollando.

**Rakontoj kaj artikoloj** pri homoj, bestoj kaj aventuroj en Borneo kaj aliaj aziaj landoj, de R. F. Vaughan: « **El Verdavalo** » por 1936; 48 paĝoj kontraŭ 5 internaciaj respondukuponoj. Mendu senpere de R. F. Vaughan, Sandakan, British North Borneo. 370

## Reklama oferto de Koresponda Paketo

enhavanta de 4 diversaj modeloj po dudek kartoj kaj dudek kovertoj, do 160 bonkvalitajn korespondilojn. Valoro hgl. 2.—; speciala prezo 1.20+10% sendkostoj.

**H.-E.O., Soesterberg** (Nederlando).  
Poŝtkonto 88015.

Presejo de Belga Esperanto-Instituto K. S.  
Antverpeno — Belgujo.

# Okaze de la Librotago kaj Kristnasko

ni rekomendas nian riĉe provizitan librofakon. Ni vendas librojn el nia propra kaj ankaŭ el aliaj eldonejoj.

Jen listo de libroj el nia propra eldonejo.

La prezoj estas indikitaj laŭ nederlandaj guldenoj. Por sendkostoj aldonu 10 %!

<b>Albanio</b> . . . . .	0.10	Hohlov. <b>La tajdo</b> . Lirikaj versaĵoj . . . . .	0.40	Schlüssel dazu . . . . .	0.40
Blicher (Bulthuis). <b>Taglibro de villaĝpedelo</b> . . . . .	0.20	<b>Ilustrita Biblioteko, serio I: Oriento</b> . La tuta serio (kvin numeroj) kostas en unu bela volumeto bindita 1.80. Unuopaj numeroj kostas 0.25. Aparte haveblaj estas n-roj 1/2 kaj 4; n-roj 3 kaj 5 estas (kiel apartaj numeroj) elĉerpitaj. Jen la titoloj de la apartaj volumetoj:		Kilian. <b>La mondon al ni!</b> . . . . .	0.60
Boatman. <b>Jes, panjo</b> . Komedioto . . . . .	0.15	N-roj 1/2. P. W. van den Broek. <b>Devi Angreni</b> , kaj: Mak Miah. Du rakontoj el Javo.		Kitzler. <b>Internacia gramatiko de Esperanto</b> . . . . .	1.25
Boatman. <b>La nekonata konato</b> . Mistera rakonto. . . . .	0.90	N-ro 3. M. C. Kuo. <b>Ribelemaĵoj virinoj</b> . Moderna hina dramo en du aktoj, tradukis S. M. Chun.		Kloepffer (Goppel). <b>Vagabondo kaj sinjorino</b> . Romano . . . . .	1.50
Bröther. <b>Rübezahl</b> . Porinfana legaĵo . . . . .	0.15	N-ro 4. Kalidasa. <b>Sakuntala</b> . Rakonto el la antikva Hindujo.		Bind. . . . .	2.50
<b>Bukedo I</b> . Rakontoj . . . . .	0.20	N-ro 5. Mil kaj unu noktoj. Tri rakontoj el la mondfama fabelkolekto.		<b>La Multekolora Libro</b> . 128 p. kun tre varia enhavo. . . . .	0.80
<b>Bukedo II</b> . Rakontoj . . . . .	0.20	<b>Ilustrita Biblioteko, serio II: La Maro</b> . Prezoj la samaj kiel ĉe la I-a serio — Jen la titoloj de la apartaj volumetoj (ĉiuj kvin estas haveblaj):		<b>La senkorpa mistero</b> . . . . .	0.10
Bulthuis. <b>Jozef kaj la edzino de Potifar</b> . Romano . . . . .	2.50	N-ro 6/7. Gerstäcker. La ŝipĉarpentisto.		Maxwell (Sampson). <b>Anstataŭa edzino</b> . Romano . . . . .	1.50
Bulthuis. <b>Malriĉa en spirito</b> . Drameto . . . . .	0.20	N-ro 8. Fock (Jarczewski). Navigado estas necesa, kaj du aliaj rakontoj.		Bind. . . . .	2.50
Dormanns. <b>Handbuch des Esperanto</b> (Lehrbuch, Grammatik, Lesebuch, Wörterbuch, 319 Seiten. (Por ĉi tiu libro oni aldonu 15 % por sendkostoj.) . . . . .	0.75	N-ro 9. Gudrun. Rakonto laŭ la konata eposo.		Meye. <b>La longa vojo</b> . Romano. Broŝ. . . . .	1.25
Bind. . . . .	1.50	N-ro 10. Cunningham (Newell kaj Sturmer). La hantataj ŝipoj. — Krome: Clarke Russell (Newell kaj Sturmer). <b>Suldpedelo sur la maro</b> .		Bind. . . . .	2.25
Elola (Berenguer). <b>La amo en la jaro dek mil</b> . Romano . . . . .	1.50	Isac (Morariu). <b>Sonorilo kaj kanono</b> . Jung. <b>La Alta Kanto de la Amo</b> . Poemo . . . . .	0.50	Oberrotman kaj Jung. <b>La lastaj tagoj de D-ro L. L. Zamenhof</b> . Kun multaj ilustraĵoj . . . . .	0.60
Bind. . . . .	2.50	Jung. <b>Landoj de l' Fantazio</b> . Romano. Broŝ. 1.50 Bind. . . . .	0.30	Osmond. <b>Travivaĵoj de Kiki</b> . Originala legaĵo por junuloj. Volumetoj I kaj II, ĉiu kostas . . . . .	0.15
Grimm. <b>Du fabeloj</b> . Porinfana legaĵo . . . . .	0.15	Jung. <b>La argéntjulea kongreso</b> . Detala raporto pri la 25-a Univ. Kongreso, kun 15 ilustraĵoj . . . . .	0.20	Otto Forst de Battaglia (Jung). <b>La mistero de l' sango</b> . Tre aktuala scienca verko. Kun multaj portretoj kaj geneologiaj tabeloj . . . . .	1.25
<b>Haefker. Jarmiloj pasas</b> . Universala historio (mondhistorio) originale verkita en Esperanto. La plej bela Esperanto-libro laŭ bibliofila vidpunkto kaj kun tre valora scienca enhavo, verkita en interesa, neniel seka stilo. Kun ses artaj reproduktajoj kaj dek unu geografiaj skizoj. Du volumoj kun ledaj dorsoj, verde kaj ore surpresitaj kaj kun fortaj ŝirmkovriloj. Ambaŭ volumoj kune La sama verko en unu volumego . . . . .	6.50	Jung kaj Wingen. <b>Das leichte Esperanto</b> . Lehrbuch für Anfänger . . . . .	0.60	Bind. . . . .	2.15
Broŝ. . . . .	4.—	Schlüssel dazu . . . . .	0.30	Bind. . . . .	2.—
Bind. . . . .	5.50	Jung kaj Wingen. <b>12 Abende Fortbildung in der Weltverkehrssprache Esperanto</b> . Lehr- und Übungsbuch für Fortgeschrittene . . . . .	0.80	Scherer. <b>Ĉirkaŭ la mondon kun la verda stelo</b> . Unua oficiala mondvojaĝo Esperanta. Kun enkonduko de Robert Kreuz. Kun 107 bildoj kaj du geografiaj skizoj. XIII kaj 272 paĝoj. . . . .	2.25
Herceg. <b>Pangea, la sole ebla eliro el la mondkrizo</b> . . . . .	0.15			Scott. <b>Filatela Terminaro</b> . . . . .	0.35
<b>Heroldo-Taschenwörterbuch</b> (Heroldo-poŝvortareto por germanlingvanoj). Tri partoj kune . . . . .	0.75			Storm (Heitmüller). <b>Du majstro-noveloj</b> (1. La B'ankĉevala Rajdanto; 2. Violo trikolora) . . . . .	1.10
1-a parto: Esperanto-Deutsch . . . . .				Bind. . . . .	2.—
2-a parto: Esperanto-Suchbüchlein. . . . .				Tolstoj A. (Pill). <b>Aelita</b> , aŭ: La Marso formortanta. Romano . . . . .	1.25
3-a parto: Deutsch-Esperanto . . . . .				Bind. . . . .	2.15
<b>Heroldo-Jugendwörterbuch</b> (Heroldo-vortareto por la junularo) Esperanto-Deutsch. . . . .	0.20			Tolstoj A. (Hohlov). <b>La morto de Danton</b> . Tragedio . . . . .	0.60
				Trögel (Schröder). <b>Esperanto kaj kulturo</b> . (Individuo — popolo — homaro) . . . . .	0.35
				Wiesenfeld. <b>Galerio de Zamenhofoj</b> . Kun 18 portretoj . . . . .	0.35

**HEROLDO DE ESPERANTO** Harstenhoekweg 223, Scheveningen (Nederlandoj).

Poŝtĉekkontoj en Aŭstrio: Wien B-59.084; Belgujo: Bruselo 2044.04; Ĉeĥoslovakio: Praha 500.566; Danlando: København 49.62; Francujo: Paris 2050.15; Hungarujo: Budapeŝt 593.79; Jugoslavio: Zagreb 408.14; Nederlando: 's-Gravenhage 1306.30; Svedujo: Stockholm 41.80.